

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO-INSTITUTO

N-ro 78 Aŭgusto 2008

Nia devizo:

Esperanto estu la unue lernenda, fremda lingvo kaj kapabloevoluiĝa lernobjekto en la bazgradaj lernejoj.

Albana proverbo: La lipoj ridas kaj la okulo ploras, la koro paciencas kaj eltenas

Estraro: Doc. Vasil Pistoli, Bardhyl Selimi, Rita Permeti

Retadreso **de** **niaj** **membroj** **kaj** **simpatiantoj:**

a_myrazi@yahoo.com,
adoci@gmx.de,
agimperaj@yahoo.it,
anila.sokoli@raiffeisen.al,
apistoli@aol.com,
arbibasho@yahoo.it,
beqirajs@hotmail.com,
bselimi@gmail.com,
cara.e@markdist.com,
cufi.izmir@yahoo.com,
donika.kapollari@rt-grp.com,
donika.kapollari@yahoo.com,
dritanxhindole@hotmail.com,
durimgurra122@hotmail.com,
egli_b@wp.pl,
eglibrati@yahoo.com,
eltonzaimi78@yahoo.com,
enkelaxhamaj@yahoo.com,
ereid@wp.pl,
ermpema@hotmail.com,
ervincanga@yahoo.com,
fiorialbtours@yahoo.com,
fl_fejzi@hotmail.com,
gentianymeri@yahoo.com,
georgespaho@yahoo.com,

hllanaj@yahoo.com,
hysaerald@yahoo.it,
klotirama@hotmail.com,
klotirama@yahoo.com,
lider_adr@hotmail.com,
lorushi_1986@yahoo.com,
matildasokoli@yahoo.com,
mgumeni@lincoln.org.al,
mimoza.blomberg@apoteket.se,
mirela_biba@hotmail.com,
motto@bwc.org,
n_limaj@yahoo.com,
ne_sokoli@yahoo.com,
notemarius@yahoo.com,
oresti_01@hotmail.com,
pistolia@yahoo.com,
ritapermeti@yahoo.com,
selimibardhyl@yahoo.com,
sh.ha@hotmail.com,
shabanhasani@gmail.com,
tcobani@yahoo.com,
uliambinozi@yahoo.co.uk,
worldofleda@yahoo.com,
zaimiarmando@yahoo.com,

Enhavo

Ni kaj ILEI, AIS, UEA

La afero de la diplomoj akiritaj cxe AIS

Respondo de prof. Carlo Minnaja

Impresoj el UK-93

Nederlando - la kongreslando

Ni dankas

La nederlanda geparo Tuinder sponsoris du albanojn

Alvenis revuoj de amikaj asocioj

Propagando

La EU komisiito pri lingvoj rifuzas Esperanton

Eseo pri 2008- la jaro de la lingvoj

Konversacia vortaro albana-esperanto

Informajxoj

La unua internacia kultura semajno en Pisa

El la leteroj

Diversaj leteroj

Impresoj de fremdaj esperantistoj pri Albanio

Impresoj de William R. Harmon en la jaro 1992

Letero de la franca geparo Jean kaj Louise Morin
Letero de Eva Berandovska
Letero el Nepalo

Rakontoj

Albin Kurti: la UNMIK prizono-impresoj

Poeziajxoj

Cxerpitaj el esperantistaj revuoj

Humorajxoj

Cxerpitaj el Nordhungaria Revuo

Artikoloj publikigitaj sur IPR

Dialektiko en la matematiko

Ni kaj ILEI, AIS, UEA

La afero de diplomoj

Al estimataj profesoroj de AIS

Fabrizio Pennacchetti, Bojxidar Leonov, Carlo Minnaja, Eva Polakova, Quednau Hans-Dietrich, Guenter, Bengt-Arne, Lobin, Reinhard Fossmeier, Renato Corsetti, Lewanderska Alicja, Andrzej kaj Regina Grzebowski, ka.

informo@ais-sanmarino.org, lewander@forst.tu-muenchen.de, stud@esperanto-turismo.org,
quednau@mytum.de, quednau@esperanto-muenchen.de, hfr@uni-paderborn.de, minnaja@libero.it,
trezoristo@ais-sanmarino.org, polakova@in.slovanet.sk, blobi1@hrz.uni-paderborn.de, stud@esperanto-turismo.com,
sarakonnerth@yahoo.de, leonov@rozabg.com, instgeo@ab-byd.edu.pl,
fabrizio.pennacchetti@unito.it, renato.corsetti@virgilio.it, renato.corsetti@gmail.com,
renato.corsetti@gmail.com, regina@strategiehr.com, andreo@rubikon.net.pl, revuo@uea.org,
jozefonemeth@yahoo.com, radp@ptt.yu, rade@ikso.net, stefan.macgill@gmail.com,

Respektindaj profesoroj,

Bondezirante al vi sanon, permesu min peti de vi helpon por solvi la malnovan problemon de AIS -diploma agnosko fare de la landaj ministerioj pri edukado.

Albanio havas jam kelkdekoj da diplomigxintoj de AIS (bakalauxrigxintaj kaj magistrigxintaj) (vidu la nomliston cxe la koncerna informilo de AIS), sed neniu el ili gxis nun ne sukcesis agnoskigi sian diplomon cxe nia ministerio pri edukado en Tirana. Kial do? Cxar cxi lasta postulas tiel nomitan apostilan stampon al la diplomoj fare de la koncerna eduka instanco.

Laux mi, la koncerna eduka instanco liverinta la diplomojn estas AIS, kiu estas registrita lauxlegxe cxe la ministerio pri edukado de San Marino. Cxu ne? Kial tiu ministerio ne surmetu tiun stampon agnoskante tiamaniere la legitimecon de AIS proceduro rilate la liverojn de la diplomojn?

En Bydgoszcz kaj ie ajn kie ekzistas klerigejoj rilatantaj al AIS, oni ne povas fari tion, cxar la diplomojn ne estas liveritaj de la sxtataj aux privataj altlernejoj tiulandaj.

Kial estas tiom malfacile peti cxe la registaro de San Marino ke gxi certigu la diplomojn, signitaj de honorindaj profesoroj de AIS, ecx en kvin lingvoj?

La albana ministerio pri edukado miras kial sur la diplomoj ne aperas la foto de la diplomigxinto kaj kial ili ne akompanatas de la notlisto pri la lernoobjektoj kaj ekzamenoj transpasigitaj de studentoj kiel kutime okazas cxi tie.

Karaj profesoroj, mi opinias ke tiu afero povas reguligxi akurate, se la Senato aux la klerigoficejo, la prezidantaro de AIS, insistas kaj interesigxas serioze cxe San Marina ministerio, por kiu tiu ago estus cetere io pozitiva ankaux por sia prestiĝo.

Se la diplomoj agnoskigxos de la unuopaj s'tatoj, certe ankaux la nombro de la studentoj sekvintus la alternejojn kie Esperanto estas unu el la laborlingvoj plialtigxus kaj la kvalito de la lingvoscio same la emo partopreni nian noblan movadon estus pli granda.

Mi esperas ke mia petletero trovos la koncernan atenton kaj mi baldaux ricevos pozitivan respondon.

Via atestime Bardhyl, sektetario de la Albana Esperanto-Instituto

Aparte por prof. Quednau

Estimata sinjoro,

Cxu eblas ke, kontrolinte la dokumentojn de la klerigoficejo de AIS, vi kompilu konfirmleteron por nia ministerio pri edukado, kie vi atestu oficiale ke "AIS (instituto scienca kaj kleriga internacia, legitimigita en la Respubliko de San Marino en la jaro____ laux dekreto____) estas liverinta diplomojn al cxi subaj albanaj studentoj. (sekvas nomlisto, jaro, titolo). La stampo aperinta sur diplomoj estas regula kaj lauxlega."

Tie vi povas ankaux sugesti kiamaniere nia ministerio povus certigxi pri la legxeco de tiuj diplomoj.

Cxu eblas? Estus konvena ke la letero akompanigxu kun la koncernaj donitajxoj (adreso, titoloj, laborpostenoj) de la profesoroj de AIS signintaj la diplomojn.

Antauxdankon!

Bardhyl

Bv. forstreki el la cxi suba nomlisto tiujn studentojn albanojn kiuj ne akiris la diplomon, kvankam aligxis al AIS ekzaminoj.

1. Dorian Kodra nr 101
2. Ilir Reçi nr. 145
3. Gjergji Spaho nr. 166
4. Jon Gumeni nr. 204
5. Arian Shuaipi nr. 205
6. Egli Brati nr. 247
7. Ariel Myrazi nr. 253, 388
8. Fioralba Cena nr. 281, 399
9. Enis Rada nr. 301
10. Edi kena nr. 314
11. Faela Mezini nr 318, 391

12. Matilda Sokoli nr. 320, 393, 486
13. Saimir Begollari nr. 332
14. Ervin Çanga nr. 336
15. Envid Cara nr. 365
16. Stela Dhani nr. 366
17. Ervis Duro nr. 367
18. Arta Kume nr. 371, 400
19. Herion Llanaj nr. 372, 518
20. Anri Subashi nr. 376
21. Erjon Lato nr. 378
22. Dorina Sadiku nr. 379
23. Edi Pashaj nr. 389
24. Andi berberi nr. 390
25. Elton Zaimi nr. 391
26. Ereid Dhimitri nr. 394
27. Egli Brati nr. 396
28. Saimir Begollari nr. 397
29. Kejd Kasmi nr. 414
30. Ulian Binozi nr. 445, 519
31. Izmir Cufi nr. 592
32. Sermen Çela nr. 510
33. Florjan Fejzaj nr. 593
34. Medion Bilal nr. 594
35. Ermir Pema nr. 595
36. Durim Gurra nr. 596
37. Marius Note nr.

Respondo de Prof. Carlo Minnaja

Kara amiko,

cxu sxtato agnoskas diplomojn lau sia bontrovo.

La situacio de AIS en San Marino estas, kiel ni plurfoje diskonigis, la jena:

AIS estas privata asocio, kies agado, lau nova, tamen jam kvinjara, statuto konsistas el instruado kaj esploro.

La statuto de AIS estas agnoskita de la sxtato San Marino, kaj AIS estas asocio registrita cxe la Tribunalo de San Marino.

Tio tamen NE implicas, ke la diplomoj donataj de AIS estas donataj de la sxtato San Marino, nek implicas ke la sxtato donas al la AIS-diplomitoj iujn rajtojn en la Respubliko de San Marino.

Tial en la diplomoj ne aperas signo de la sxtato. La sola afero kiun la sxtato povus dispongi estus atesto pri la ekzisto de AIS kaj ghia registrigxo kiel privata kultura kaj instrua asocio.

Aperigo de foto au' atesto de notoj cetere entute ne ekzistus ecx en la diplomoj, kiujn la sxtato (nek itala nek sanmarina) agnoskas kiel rajtodonajn.

Saman statuson en Italio ekzemple gxuas Goethe Institut au British Council: ili eldonas diplomojn kiuj estas tute privataj, al kiuj la itala sxtato anekzas neniun rajton; tiuj diplomoj valoras kiom la akceptanto de tiuj diplomoj volas doni al ili. Parenteze dirite, iu industrio kiu havas filion en Germanio multe pli favore rigardas diplomon de Goethe Institut ol sxtate agnoskitan universitatan doktoran diplomon pri la germana. La rumana sxtato agnoskis la AIS-diplomojn, la pola same (teorie), la slovaka same (teorie); tiun teoriecon eblas kontroli, kiam efektive AIS-diplomito iras al la koncerna sxtata oficejo kaj petas pri la rajtoj, kiujn la teoria agnosko donas. Tio efektive okazas en Pollando, la AIS-diplomitoj, kiuj estas samtempe diplomitoj

de turisma postmezgrada lernejo en Bydgoszcz ricevas de la sxtato rajton cxixxeroni. Sed pli ol tiom mi ne scias, ekzemple mi ne scias, cxu nia bulgara filio eldonas diplomojn kiuj estas sxtate agnoskitaj. Kompreneble, se pli multaj sxtatoj, kaj pli prestigxaj univesitatoj agnoskus rajtojn al la AIS-diplomitoj, la lernantoj plimultigxus.

Kun kora saluto

Carlo Minnaja

Dip. Matematica Pura ed Applicata

Via Trieste 63

35121 PADOVA

<http://www.math.unipd.it/~minnaja>

Traduko en la albana

I dashur mik,

Çdo shtet i njeh diplomat sipas mënyrës së vet

Gjendja e AIS San Marino sikur e kam thënë disa herë është si vijon:

Veprimtaria e saj është private, e cila sipas statutit tashmë pesëvjeçar, qëndron në hulumtime dhe mësimdhënie.

Statuti i AIS është njohur nga shteti i San Marinos dhe shoqata e AIS është regjistruar në Gjykatën e San Marinos.

Megjithatë kjo nuk sjell që diplomat që lëshon AIS, janë lëshuar nga shteti i San Marino, as nuk sjell që shteti i San Marinos u jep ndonjë të drejtë të diplomuarve në Republikën e San Marinos.

Prandaj në diplomat nuk është vula e shtetit të San Marinos Gjëja e vetme që mund të bëjë shteti i San Marinos është të dëshmojë që AIS ekziston dhe është e regjistruar si shoqëri private kulturore dhe arsimore.

Vënia e fotografisë dhe e listës së notave në diplomë nuk është praktikë as në Itali as në San Marino ku diplomat japin të drejta.

Një statut të njëjtë gëzon në Itali p.sh. Instituti Gëte apo Këshilli Britanik, ato lëshojnë diploma që janë krejt private, të cilave shteti italian nuk u anekson ndonjë të drejtë, diploma të tilla kanë aq vlerë sa u jep ai që i pranon. Në parantezë mund të them që në se ndonjë industri ka filiale në Gjermani ajo i vlerëson më shumë diplomat e Institutit Gëte se sa ato të dhëna nga universitetet gjermane për gjermanishten.

Shteti rumun i ka njohur diplomat e AIS, po ashtu (në teori) ai polak, ai sllovak. Kjo anë teorike mund të provohet kur i diplomuari paraqitet në institucionet e atij vendi dhe kërkon ndonjë të drejtë. Kjo ndodh në Poloni, ata që janë diplomuar nga shkolla turistike pasgjimnazit në Bydgoszcz dhe AIS kanë të drejtën e punës si ciceron.

Më tepër se kaq nuk di, nuk di në se filiali ynë në Bullgari lëshon diploma që njihen nga shteti bullgar. Kuptohet sa më shumë shtete dhe universitet prestigjioze t'i njohin diplomat tona aq më i madh do jetë numri i studentëve të diplomuar pranë AIS.

Përshëndetje të përzemërta

Carlo Minnaja

Dip. Matematica Pura ed Applicata

Via Trieste 63

35121 PADOVA

<http://www.math.unipd.it/~minnaja>

Nota: cxi afero estis pridikutata ankaux dum la UK 93 en Roterdamo. Mi kompilis la jenan raporton.

En la albana:

Çështja e njohjes së diplomave

Me rastin e pjesëmarrjes në Kongresin botëror të Esperantos në Rotterdam nga 19-16 korrik 2008 unë i takova personalisht disa drejtues të UEA (Organizatës botërore të Esperantos) dhe disa senatorë të AIS (Akademisë ndërkombëtare të Esperantos). Atyre u parashtrua nevojën për një dokument që konfirmon ligjëshmërinë e AIS mundësisht të dale nga San Marino me qenë se disa dhjetëra të lauruar shqiptarë pranë AIS nuk po marrin njohjen e diplomave nga ministria jonë e arsimit. Për këtë i foli zotit Fabrizio, kryetar aktual i AIS, zotit Renato Corssetti, ish kryetar i UEA, zotit Ranieri Enrico, antar i Kryesisë së UEA. Zoti Fabrizio ishte në dijeni por më tha se për këtë qëllim duhet ndërmarrë një rrugëtim deri në San Marino për të nxjerrë dokumentin në fjalë nga gjykata e atjeshme. Këtë mund ta bëjë ai ose prof. Carlo Minnaja, i cili na ka dhënë një përgjigje me shkrim (shiko në këtë numër). Prof. Renato që jep mësim në universitetin La Sapienza të Romës dhe ka gjithnjë gatishmëri për të na ndihmuar ju luta të kontaktonte ndonjë nga qeveria e San Marinos për këtë qëllim. Po kështu i thashë zotit Ranieri i cili ka qenë dikur edhe në Sqipëri dhe ka gatishmëri për të ndihmuar. Prof. Quedanu ishte në kongres por nuk arrita ta takoj (ishin 1800 delegatë) megjithëse mora pjesë në të gjitha ligjëratat e profesorëve të AIS. E shoqja Alicja ishte në një takim me veteranët, por sapo mbaroi takimi kishte ikur. Më pas më kish lënë një pusullë që ta takoja, por nuk erdhi në ato ligjëratat. Prof. Maitzen, senator, më tha kur po dëgjoja ligjëratën e tij për astronominë, se prof. Quedanu po më kërkonte. Gjithësesi i thashë edhe atij për problemin tonë.

Tani unë mendoj që ju, ish studentët e lauruar, përveç meje, t'u shkruani letrën e mëposhtme profesorëve sipas adresave që keni këtu ku t'i lusni të bëjnë çmos për ta zgjidhur këtë problem. Fabrizio, Ranieri, Barbara kanë edhe telefona celularë ku mund të dërgoni mesazhe pa problem në italisht, apo polonisht, apo Esperanto.

Ja edhe teksti i letrës suaj në shqip e pastaj në Esperanto:

Në shqip

Të nderuar profesorë, unë jam një ish student i lauruar pranë AIS në vitin _____. Quhem _____. Diplomën që kam marrë nga ju ende ministria jonë e arsimit nuk po e njeh. Ajo kërkon një konfirmim me vulë apostile nga institucionet e larta arsimore të shtetit përkatës (në këtë rast të San Marinos që e ka ligjëruar AIS). Mbase do ishte e udhës të kishim një dokument zyrtar nga gjykata e San Marinos që ka ligjëruar AIS të cilin lutem ta merrni ju. Unë mund të ndihmoj për shpenzimet tuaja të udhëtimit e të tjera lidhur me këtë. Më thoni sa ju detyrohem. Unë kam këtë numër telefoni celular _____ dhe këtë adresë në internet _____. Shpresoj të marr një përgjigje nga ju. Me shumë respekt _____

Në Esperanto

Honorindaj profesoroj, mi estas eksa studenta bakalauxrigita cxe AIS en la jaro _____. Mi nomigxas _____. La akiritan diplomon cxe vi nia ministrejo pri edukado ankoraux ne agnoskas. Gxi postulas konfirmilon per apostila stampo de la altaj edukaj institucioj de la koncerna sxtato (cxi kaze de San Marino kiu estas legxiginta AIS). Eble estus konvena ke ni ekhavu dokumenton oficialan de la jugxejo de San Marino kiu legxigis AIS kiun vi estas petata ricevi por mi. Mi povas helpi por kovri viajn vojaĝkaj aliajn elspezojn rilate tion. Nur diru kiom da mono mi sxuldas al vi. Mi posedas cxi numeron de la portebla telefono _____ kaj cxi adreson retan _____. Mi esperas ricevi respondon de vi. Je profunda respekto _____

Adresat

Fabrizio Pennacchietti fabrizio.pennacchietti@unito.it, mobile phone 0039 349 436 70 10

Probal Dasgupta, kryetar i UEA probal53@yahoo.com, Ranieri Clerici, antar i Kryesisë së UEA tel cel. 0039 6 97 600 326 ranieri.clerici@tin.it, Claude Nourmont, antare e kryesise se UEA moonmont@pt.lu, Barbara Pietrzak, sekretare e pergjithëshme e UEA tel cel 0048 600 051 425 bpietrzak@onet.eu, Loes Demmendaal antar I kryesisë së UEA a.demmendaal@planet.nl, Hori Yasuo antar I Kryesisë së UEA horizonto@eatr.sannet.ne.jp, Jose Antonio Vergara, antar I kryesisë së UEA joseantonio.vergara@gmail.com, Osmo Buller, drejtor I zyrës qendrore të UEA u ea@co.uea.org, direktoro@co.uea.org,

AIS: senatorët informo@ais-sanmarino.org, lewander@forst.tu-muenchen.de, stud@esperanto-turismo.org, quednau@mytum.de, quednau@esperanto-muenchen.de, hfr@uni-paderborn.de, minnaja@libero.it, trezoristo@ais-sanmarino.org, polakova@in.slovanet.sk, blobi1@hrz.uni-paderborn.de, stud@esperanto-turismo.com, sarakonnerth@yahoo.de, leonov@rozabg.com, instgeo@ab-byd.edu.pl, fabrizio.pennacchietti@unito.it, renato.corsetti@virgilio.it, renato.corsetti@gmail.com, renato.corsetti@gmail.com, regina@strategiehr.com, andreo@rubikon.net.pl, revuo@uea.org, jozefonemeth@yahoo.com, radp@ptt.yu, rade@ikso.net, stefan.macgill@gmail.com, renato.corsetti@virgilio.it, renato.corsetti@gmail.com

Të fala Bardhyli

Shënime: ja disa letra të ardhura për këtë çështje:

- I dashur Bardhyl,

Kjo historia e njohjes se diplomave po vazhdon gjate. Ne fakt, problemi eshte teper i thjeshte dhe permblidhet ne sa me poshte:

Ne diplomat e AIS duhet nje vule APOSTILE qe mund te vendoset nga shteti qe njih shkollen, ku ehste bere ky program. Kjo vlen vetem per te thene qe kjo eshte nje shkolle e njohur. Ne rastin konkret kjo duhet vendosur nga organizata shtetore ne Poloni, psh bashkia ne Bydgosz apo nga Ministria e Arsimit, qe e njih shkollen Monda Turismo, se bashku me programet e saj, perfshi ate te AIS. E gjithë puna duhet zgjidhur me ata Monda Turismos, se ata e dine kush i njih (organizem shtetror) e kush I ka akredituar/njohur. Nese mund ta pyesesh kete gje, do jete shume mire dhe e mjaftueshme.

Gjithe te mirat dhe falemnderit,

Maksim Gumeni

- Prof. Bardhyli pershendetje,

Pasi i kam derguar te gjitha materialet prane ministrise se Arsimit , sot kam mare pergjigje si me poshte:

Zj. Cenamora informacion nga koleget ne Europe qe nuk i njohin diplomat e ketij Universiteti pasi nuk ploteson kriteret. Me kryesorja - nuk eshte i akredituar. Nese ke informacion ndryshe, kush e ka akredituar dhe ne cfare cilesie (jo thjesht si organizate, por si unievrstet, ma dergoni qe ta verifikoj

Edmond Cane, në Ministrinë e Arsimit

- Kara Kolego-
kvankam la afero estas inter la Senato kaj vi, mi nur margene volas denove ripeti :

studentoj herian kaj Binori- devas veni al Bosnja- ili havas diversaj atestoj (ecx kelkaj ili ne deprenis de Mirka Zielinska) sed sxi diris ke en indekso sxi menciis.

Se ili volas ili povas studi en viaj universitatoj en Albanio- ankaux estas turismiko en privataj kaj sxtataj alternejoj en diversaj landoj- ne necesas ke estu kun kaj pri esperanto.

Se temas pri AIS diplomoj- se ili estis post la defendo enskribita en Nitra, Karlovo cxu Sibiu- estas konfirmo. Sed ne cxiuj studentoj pri tiuj aferoj zorgas. laux mia informo pluraj mgr kaj bak de AIS ne nur laboras kun AIS diplomo sed ankaux venkis en konkursoj pri posteno.

Ankaux mi scias ke Binozi studas kaj laboras en USA kun AIS diplomo.

Do eble oni ne agnosku ateston (licencia) de MT - kie staras Studumo en.. AIS klerigejo

Alia afero ankoraux ne estis klarigita viaj du studentoj absolute ne kontaktis min nek respondis al miaj leteroj. Ili ne bezonas nur studi en PL kaj en BG sed ankaux povas studi en viaj universitatoj kaj - tio ecx estas simple- fari adopton.
Bozidar Leonov plurfoje ofertis studadon kaj en Burgas kaj en Karlovo.
La lasta peto- ne estis klarigita afero kun S-ro St Mandrak, kiu dum lasta stud sesio en bydgoszcz sentis sin ofendita kaj konstatis ke viaj studentoj ne partoprenis kursojn) kial ?

amike kaj sincere **Alicja Lewanderska**

Mi cxiam kaj Bozidar provas helpi al studentoj, sed devas tamen esti respektataj reguloj.

Ab Ankaux mi pensas ke anstatau skribi al cxiuj (intere aliaj ne ligitaj kun AIS) estas pli bone renkontigxi en Roterdamo kaj Banja Luka kun AIS Senato.

- Kara Bardhyl Selimi

mi tre petas necese kontaktu kun HDQuednau cxar viaj ambaux studentoj ne havas sufcixe de STU

Ili do povas partopreni ecx en Tirana- sed necese devas havi- Alia peto- bv klarigu kun kol Mandrak- cxar estas flanke de li rimarko, ke kelkaj albanaj studentoj ne tro bone partoprenis lian

kurson. Bv klarigu kaj mildigu- certe tio estas miskompreno.

amike- Alicja

UK 93- Impresoj

Duan fojon mi partoprenis UK, cxikaze en Roterdamo de Nederlando. Antaux du jaro, mi estis en Florencia UK kaj ege sxatis tion. UK-oj farigxis ende longe belega tradicio en nia movado. Ili estas ne nur grandaj kunvenejoj de esperantistoj el la tuta mondo, sed same renkontigxejoj, amikigxejoj, someraj klerigejoj-universitatoj, kaj plue, kial ne, ankaux enamigxejoj.

Bedauxrinde, pro cxefe financaj kialoj, gxin partoprenas plejmulte olduloj, kvankam ekde plural jaroj okazadas paralele ankaux tiel nomata Kongreseto, kie aligxas infanoj gelernantoj. Mi sxuldas la aligxooblecon mian kaj de mia edzino al la nobla nederlanda geparo Vera kaj Jacques Tuinder, kiuj kovris preskaux cxiujn miajn elspezojn.



Babilante kun la nepo de Zamenhov

La loka organiza komitato kunlabore kun la CO de UEA kiu sidejas ekde duonjarcento en Roterdamo, estis akirinta la permeson okazigi la kongreson en la pljej impona domo de la urbo, en la Burso, centro de la Komerca parto kaj tuj apude de la urbodomo. Temas pri urboparto tute detruita dum la dua mondmilito sed moderne rekonstruita poste.

La solena malfermo de la Kongreso estigxis en granda koncertejo dum la aliaj kunsidoj kaj aktivecoj en la pluraj komfortaj salonoj de la unua etagxo de la domo.



En la granda halo de la Burso

Denove mi ekgxuis la fratecan etoson en la sino de esperantistoj kiuj tute ne bezonas interpretistojn kaj apenaux sin distingas pro raso, koloro, etneco, nacieco, klereco aux religieco cxar cxiuj interkomprenigxas en Esperanto.

Pli ol 1800 delegitoj pluvigligis la urbon Roterdamo kiu konsistas ankaux je duone de sia logxantaro el eksternederlandanoj.



Esperantistoj svarmas sen la kongresejo

Estis plezuro por mi renkonti amikojn konatajn danke al korrespondo aux persona kontakto antauxe en alilandaj okazintajxoj esperantistaj, kiel ekzemple Maria, Aurora, Julia, Mihai el Rumanio; Fabrizzio, Ranieri, Renato ka. el Italio; Jozefo el Izraelo; David kaj Paul el Britio; Edmund, kaj Morin el Francio; Alicja, Uwe, el Germanio; Kowalski, Grzebowski, el Pollando; Kim el Koreio; Agnes el Belgio; Radenkoko kaj Josip el Kroatio; Johan kaj Svetlana el Nederlando ka.

Mi havis la okazon auxskulti prelegojn de tiaj majstroj kiel Katalin Smidelius, Baldur Ragnarson kaj profesoroj de AIS, kaj babili kun gravuloj de UEA kiel Dasxgupta, Osmo Buller, nepo de Zamenhov, ka.



Junaj nederlandinoj

Ni gxuis same la koncertojn de kantistoj, pianistoj, flauxtistoj kaj gitaristoj. Aparta evento estis la partopreno en la kunsido de Komitato pri la Etnaj Rajtoj kie oni diskutis pri Sindecido en la kazo de Kosovo, en la kunsido de Veterana Klubo, de Azia Societo, aux de Medicinistaj Fakuloj. Mi akiris ecx poentojn dum la sesio pri astronomio gvidata de profesoro Maitzen.

Interese estis babili kun plurdekaj ordinaraj esperantistoj el diversaj landoj kun kiuj ni dormis en la sama amaslogxejo Sleep in de Mafkees je favora prezo. Tie estis multe da eblecoj interkonatigxi kaj intersxangxi niajn impresojn.



Dum la pauxzoj inter la sesioj

Dum la kongresaj tagoj mi atentigis la gravulojn de AIS kaj UEA pri la fakto ke la diplomoj liveritaj de AIS ankaux al kelkdekoj da albanaj gestudentoj ankoraux ne akiris agnoskecon fare de ministreje pri edukado, pro tio bezonatas ia interveno urgxa. Krom Roterdamon, mi vizitis ankaux Amsterdamon kaj restis ravita de la beleco de tiu unika urbo ne nur en Nederlando.



Amsterdamo unika

Gxenerale vizito al Nederlando impresigis ege min, cxar temis pri sufcixe evoluinta lando kie lernis kaj verkis multaj eminentuloj el la tuta mondo. Tiu lando estas nun por mi fama ne nur pro gxiaj tulipoj, digoj kontraux la maro, vastaj pasxtejoj por bovinoj kaj sennombraj ventomuelejoj, sed cxefe pro laborema kaj bone edukita popolo, kies toleremo, manko de antauxjugxoj kaj gastemo ebligis al milionoj da enmigrintoj el Afriko kaj Azio kunvivi bonstate kaj felice kun enlandanoj, pliviglante ties logxlokojn.

Bardhyl Selimi 30an de julio 2008

Nederlando, la çi-jara kongreslando

Euromast

Nederlando, situanta çe la Norda Maro kaj çe la enfluejo de tri grandaj riveroj / Rejno, Mozo kaj Skeldo / estas malgranda, dense loĝata kaj tre evoluinta lando.

Pli ol la duono de la lando situas sub la marnivelo, pro kio necesas multaj digoj kaj pumpiloj por teni la terenon seka. La Deltolaboroj, kiuj ekestis post la granda inundo en 1953, nun bezonas aktualigon. La antaŭvidita altiĝo de la marnivelo, la daŭra sinkado de la polderoj kaj la alfluo de la akvomasoj tra la riveroj postulas enormajn laborojn.

Nederlando estas konstitucia monarkio kun parlamenta sistemo. La ŝtatestro estas la Reĝino Beatrix. La sidejo de la registaro troviĝas en 's Gravenhage / Den Haag / Hago /; Amsterdamo tamen estas la ĉefurbo de la lando. Nederlando konsistigas kun la Nederlandaj Antiloj, situantaj en la Kariba regiono, la Reĝlandon Nederlando. Sabate, fine de la kongreso vi povos sperti tiun Kariban etoson dum la somera karnavalo, kiu trairos la urbocentron, sed jam en la antaŭa tago eblos sperti la tiel nomatan batalon de tamburoj.

En Nederlando loĝas pli ol 16 milionoj da homoj. La plej densa koncentriĝo de la loĝantaro troviĝas en la „Randurbo Holando”, la grupo de urboj en la okcidento de la lando: Amsterdamo, Hago, Roterdamo, Utreĥto. La kongresurbo Roterdamo estas urbo kun tre internacia loĝantaro el pli ol 160 naciecoj. Vi do certe havos la eblon konatiĝi kun multaj kulturoj.

Roterdamo ne plu estas la plej granda haveno de la mondo, ĝi tamen estas la plej granda transithaveno por Eŭropo. Kaj en la baldaŭa estonto la havena tereno eĉ pligrandiĝos, kiam oni konkeros pli da lando el la maro por konstrui la duan Mozebenajon.

Ĉar la urbocentro de Roterdamo forbrulis, ĝi ne havas historian kernon, sed male ĝi estas konata pro sia moderna arkitekturo. Ĝi havas ankaŭ la mondkonatan artmuzeon Boymans kaj ekzemple modernajn statuojn vi trovos malavare dissemataj en la urbo.

Sed eble plej interese por esperantistoj estas la urbo de la jubileanta UEA. Kaj ni festos la 100-jariĝon en la centro de nia movado: Roterdamo.

Loes Demmendaal /el la 2008. jara revuo ESPERANTO/

Ni dankas

- Elkoran dankon al la nobla nederlanda geparo Vera kaj Jacques Tuinder kiu sponsoris la vojaĝojn kaj aligis elspezojn por du albanoj (Vjollca kaj bardhyl Selimi) al la 93-a UK en Roterdamo
- Dankon al kroataj samideanoj Josip Pleadin kaj Radenko Milosxevicx pro regula sendado de ties cxiam bonkvalita revuo “Zagreba Esperantisto”.
- Dankon al israelaj esperantistoj Josef Sxemer ka pro regula sendado de ties revuo “Israela Esperantisto”
- Dankon al s-ino Sigmond Julia kiu sendas regule la ricxenhavan revuon : Bazaroo”

Informaĵoj

Pisa - Septembro 2008 - 1a Semajno de Kulturo Internacia

De jhaŭdo 18an de septembro ghis merkredo la 24an okazos en Italujo nova junulara arango, iom malsimila de la ghisnunaj.

Ghia nomo estas 1a Semajno de Kulturo Internacia (SKI), sed ghi ne okazos sur negho...

Sinteze, urbestroj de 6 urbetoj proksimaj al Pisa (San Giuliano Terme,

Cascina, Vecchiamo, Calci, Vicopisano, Buti) invitas 25 junajn esperantistojn ne-italajn kaj 10 italajn dum unu semajno en siaj urboj por prezenti siajn kulturojn kaj Esperanton al la lokaj mezgradaj studentoj kaj al la loka junularo ghenerale.

Ili pagos chion surloke (de alveno ghis foriro: manghoj, dormoj, movighoj), intershanghe de tiu "kultrura laboro".

Sekve, ni ne petas "alighojn" (vi devos pagi nenion al ni, nur zorgi alveni ghustatempe. ...) sed "kandidatighojn" - char nia respondeco (de Itala Esperantista Junularo) estas provizi kiel eble plej "varia" kaj "kvalita" partoprenantaro, ankaù char aliaj urbestroj italaj jam envicighis por ripeti la ekzperimenton estonte.

Inter la kandidatoj ni rapide elektos la partoprenontojn.

Pliajn informojn vi trovos, post kelkaj tagoj, en la retpagho <http://ski.esperant.oitalia.it>

KANDIDATIGHA DEMANDARO

- (1) Nomo:
- (2) Familia Nomo:
- (3) Sekso:
- (4) Naskighdato:
- (5) Retadreso(j) :
- (6) Loghurbo:
- (7) Adreso:
- (8) Nacieco(j):

- (a) Kiam kaj kiel vi esperantighis?
- (b) En kiuj esperanto-renkontig hoj vi jam partoprenis?
- (c) Kiel vi prezentus vian landon al mezlernejaj knaboj?
- (d) Chu vi konas popolajn dancojn el via lando? Kiujn? Chu vi pretas ilin montri?
- (e) Chu vi kapablas ludi muzikon aù kanti popolajn kantojn de via lando?
- (f) Chu vi kapablas kuiri tipajn manghajhojn el via lando? Kiujn?

ghin sendu (kompilita) al
<kandidatigxoj. ski (heliko) [gmail.com](mailto:ski@esperanto.it)>

Informitale

Itala Esperanto-Federacio - <fei@esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo - <iej@esperanto.it>

via Villoresi, 38 I-20143 Milano - Tel+fax +39 02 58100857

<http://www.esperanto.it>

Kontribuojn sendu al: f.amerio@libero.it

Kompilanto: Francesco Amerio <f.amerio@libero.it>

Propagando

La EU komisiito pri lingvoj Leonard Orban rifuzas Esperanton

La institucioj de EU, inspiras la multlingvecon de la civitoj.

Leonard Orban, la ano de la Eŭropa Komisiono kun respondecado pri multlingveco, komence de Februaro skribe respondis al la grandkvantaj komentoj de esperantistoj, aperintaj en la retforumo de EU pri multlingveco. Laŭ Orban ekzistas pluraj motivoj, pro kiuj Esperanto ne povas iĝi pontolingvo en Eŭropa Unio. Unuflanke li atentigas, ke kreado de kompletaj terminaroj por tute novaj uzokampoj de Esperanto estus enorma, multekosta laboro.

Aliflanke li asertas, ke ekesto de pontolingvoj estas "historie spontana fenomeno socilingvistika, ne rezulto de decidoj leĝofaraj kaj politikaj". Samtempe li diras, ke li mem "ne kredas" je pontolingvoj, sed ne komentas la ĉiam kreskantan rolon de la angla kiel ĝuste tia pontolingvo en EU.

<http://forums.ec.europa.eu/multilingualism/>

Pri la retpaĝo ni povis legi la plej gravajn kialojn de lia rifuzo de Esperanto.

„... La kadrojn de la plurlingveco de la Eŭropa Unio, unusence regulas la Porkolektiva-juro. Unu lingvo nur tiam povas iĝi oficiala lingvo de la UNIO, se ĝi konvenas al tri kondiĉoj.: Ĝi estas enkonstituciigita oficiala lingvo de iu membroŝtato; la menciita membroŝtato petas rekoni ĉi lingvon kiel UNIO nivelan oficialan lingvon, la pluraj membroŝtatoj aprobas unuanime.

Ĉi estas unu el tiuj kialoj, pro kiuj la Esperanto ne povos iĝi la **peranta lingvo** de la Eŭropa Unio. La alia kaŭzo interrilatas kun alia karakteriza propreco de Esperanto. En kazo de tiuj lingvoj kiel la Esperanto, al ĝia vort-trezoro ne ligiĝas pli grava socia kaj kultura realeco.

Okaze de iu artefarita lingvo, vortotrezoron de plenaj fakteritorioj, oni devus krei, kaj de tio estas logdistancaj ekzercas kaj financaj sekvoj....La tria kialo estas pli persona: mi ne kredas iun perantlingvan ekzist-rajton:estu ĝi la Esperanto, latina, aŭ la angla....”

Sinjoro Leonard Orban diras severan kritikon al ni. Tiun-ĉi kritikon ni ne tre ŝatas, ĉar kvankam ĝi antaŭenmontras, tamen retenas. Ĉi tie estas la celo: ni devas kunkolekti plikaj pli da fakvortoj pri la eble plej multe da tereno de la vivo, eĉ same, kiel la fervojistoj. Ni portu ĝin en la instruon kaj la ekzamenmaterialon. Kial? Ĉar tiuj vere bezonatas. Kaj ne nur por la uzantoj de unuopaj fakterenoj, sed ankaŭ pro la vortoj transprenitaj al la ĉiutaga vivo. Se ni konas pli kaj pli, ni povas sinesprimi pli bone.

Kaj ni pensu pri tio, ke lingvomaterialo neuzata perdiĝos. Mi neniam pensintus, ke dum la mezlernej-jaroj legitan kaj ekzercitan (malnov-anglan) lingvon de Shakespeare dramoj, mi povos uzi iam. Tamen tio okazis en 1969, en la frieslanda Leenwarden mi povis bone uzi, kompreni ĝin kune kun Esperanto. Ni pensas, ke la lernantoj kiuj lernas esperanton, nur por akiri diplomon, neniam iĝos esperantistoj. La scio ne perdiĝas. Mi esperas, ke iam ankaŭ ili returniĝos al uzo de Esperanto, se ili havos pli da tempo por okupiĝi per tio, kiam ili travivos ties iun bonflankon.

Oni devus instrui Esperanton larĝe, ke ĝi pleniĝu vere la rolon de la helplingvo.

S-ro Leonard Orban, tamen ne havas veron. Li parolis pri kialoj, kaj inter ili pri la leĝa. Nur pri tiu li ne pensis, ke la leĝoj ne estas eternaj, ofte ŝanĝiĝas en intereso de la vivcirkonstancoj. Oni kial ne ŝanĝus la nunan leĝon en intereso de la homaranismo, de la juŝteco, demokratio? Ja en EU oni parolas pri tiu, ke bazo de EU estas la multlingveco laŭleĝe, kaj kontraŭe ili tamen ne tradukas ĉiun tekston al la nacilingvoj, ĉar ĝi multekostas.

Laŭ ne nur mi, sed ankaŭ multaj pensantaj homoj: se estus akceptata iu pli facile ellernebla kaj uzebla lingvo ol la angla aŭ la latina, ankaŭ la traduko fluus pli facile de tiu en la nacilingvojn. Pripensu: kiam ekiris la fervoj-, aŭ la aŭtomobiltrafiko, aŭ la uzo de alispecaj veturiloj, ankaŭ tiam oni devis krei novajn leĝojn por helpi la homojn kaj malhelpi la akcidentojn, katastrofojn. Kial ne okazebus tiu ago same, rilate Esperanton? Ja, tiu viva lingvo jam pruvis, ke ĝi povas esti bone aplikata en terenoj de komerco, turismo, fremdultrafiko, per kiu oni transdonas sian kulturon al aliuloj.

Mi rakontas miajn du spertojn. Dum somero de la 1980-a jaro, unu finnlanda kantoĥoro faris viziton en Miskolc, al invito de la ĉi tiea kantoĥoro. Kune kun la finna kantoĥoro alvenis ankaŭ mia esperantista korespondantino el Tampere. La grupoj informiĝante, ke ni ambaŭ estas esperantistoj, ekinteresiĝis: kiel ni povus bonfunkcii kiel interpretistoj de la du grupoj.

La tutnombro de la grupanoj estis 120. Sylvia Hämäläinen kaj mi interpretis tiel bone dum la interpret-prezento, ke dum la sekvaj tri tagoj ni iĝis la petitaj interpretistoj de la du grupoj. Ĉi sukceson mi ne povas forgesi.

Imagu, ĉi interpretista sukceso ripetiĝis dum printempo de ĉi 2008-a jaro (4-6. Aprilo), kiam okazis la Hungespola Renkonto, en kadro de la Interkultura Dialogo. Tiam la geedzoj Pásztor faris programon kaj aranĝis la renkont-aferojn de 51 membra pola grupo. Jolanta Kieres (la prezidantino de Esperanto Klubo de Novy-Sącz: Pollando) tuj poligis ĉiun esperantlingvan eldiron de Adrienne Pásztor, ĉar en la pola grupo ankaŭ neesperantistoj alvenis en urbon Miskolc: la urbestro de Białystok, reprezentantinoj de Universitato de Łódź kaj de Urbeŝtaro de Łódź, krom la aliaj universitatoj de Łódź. La rezulto de la elstara kunlaboro estis la kunfandiĝo de la du grup-partoj, kaj kelkuloj anonciĝis por lerni la internacian lingvon.

Se vi rigardos la foto-rubrikon: Pola Renkonto, sur la retpaĝo <http://kiralylajos.extra.hu> Vi povos konstati, ke la humuro estis bonega, la per interna ĝojo hejtitaĵoj brilis. Sed, bedaŭrinde nur tiuj konas kaj scias pri la grandaj ebloj de ĉi lingvo, kiuj havas jam tiujn travivaĵojn. Ambaŭfoje ni verkis kaj disdonacadis informtekstojn pri la vidindaĵoj, valoroj de urbo Miskolc kaj de nia regiono. Por la ekskurs-grupoj tiuj donacoj iĝis necesaj aneksaĵoj ĉe la interkulturaj dialogoj.

Ni devas tiel klopodi, ke ĉiutere ne atingu rekonon de niaj landoj kaj de EU. Je tiu nun ekzemplo estas, ke la EU financos la projekton:

„Per Esperanto traduki infanlibrojn al nacilingvoj. La Eŭropa komisiono aprobis tradukprojekton de infanlibroj, en kiu esperanto rolas kiel pontolingvo.

EU financos per 64000 Eŭroj laŭ projekton, en kiu infanlibroj pere de Esperanto estos tradukitaj inter la bengala, itala, slovena kaj kroata lingvoj kaj poste distribuitaj en elementaj lernejoj.

La eldonprojekto, kiun ellaboris por Kroata Esperanto-Ligo Zlatko Tišljarić, kaj en kiu

partoprenos kiel partneroj Edistudio el Pisa (Italio), inter-kulturo el Maribor (Slovenio) kaj barata eldonasocio Samatat Siksha – Samatat Prakashan el Kalkato, estis aprobita de kultura agentejo de Europas Komisiono (EACEA).

EU financos la projekton per 64000 eŭroj. La projekto antaŭvidas ke ĉiuj partneroj (itala, slovena, kroata kaj barata) tradukos el siaj lingvoj unu infanlibron de sia literaturo al Esperanto. Poste la barata partnero plutradukos la tri eŭropajn librojn el Esperanto en la bengalan, kaj la tri eŭropaj partneroj tradukos la baratan libron ĉiu al sia nacia lingvo. Post kiam ĉiuj eldonos la librojn, oni distribuos ilin en elementaj lernejoj de siaj urboj kaj organizos legokursojn inter la infanoj. La plej bonaj verkoj de la infanoj pri libro legita kaj apartenanta al alikontinenta kulturo estos premiitaj. Pri la tuto la eldonistoj daŭre informados la gazetaron, radion kaj televidon.

La barata partnero kunlaboras kun la prezidanto de UEA, Probal Daŝgupta. La projekto estos efektivigata inter Majo 2008 kaj Majo 2010. Tiu estas la unua tiaspeca interkultura projekto uzanta Esperanton, kiun finance subtenas eŭropa Komisiono.

Raportis Zlatko Tiŝljar. (<http://www.liberafolio.org/2008/eubaratalibro>)

Mi bedaŭras, ke ni Hungaroj ne partoprenas ĉi projekton. Mi volonte tradukintus infanlibrojn, kunlabore la menciitaj esperanto organizaĵoj. Sed, s-ro Zlatko Tiŝljar menciis, ke en alia simila projekto ankaŭ Hungaroj partoprenas jam.

Kaj denove bona okazintaĵo:

En Svislando oni kandidatigis UEA, al NOBEL premio. (Laŭ la pola retgazeto Freŝo) La antaŭeniro de Esperanto estas malrapida, tamen certa!

Oni ofte demandas min, ke ĝis nun oni kial ne enkondukis Esperanton en la lernejan instruadon. Kaj al la demandantoj, kaj, la vi mi diras la samon. Al la lingvoinstruo ni mem la homoj faras la ekonomiajn, homajn kaj politikajn barilojn.

En la libro de Gados László-Szabadi Tibor J: Az angol mint az európai lingua franca? (La Angla, kiel la eŭropa „lingua franca” (perantlingvo de la Mediteranareo) – mi legis, ke vere... la unua grava eksperimento okazis por internacie oficiale akcepti esperanton, dum la unuaj kelkaj asembleoj de la Ligo Nacioj, estigita post la Unua Mondmilito. La propono, kiu temis pri la por instrucele lerneja enkonduko de Esperanto, kaj kiun apogis esploraj rezultoj kaj rekonaj ekspertizoj, - iĝis flankenpuŝita pro la maĥinacioj de la franca kabineto, kiu timis la hegemonion de la franca lingvo.

Poste la politikaj situacioj jam ne favoris al nova propono.

En Hungario la socialisma ordo favoris al Esperanto, la ŝtato subtenis ĝian movadon kiel kulturalan agadon. Post la politika ŝanĝiĝo tiu subteno grandparte ĉesiĝis.

Nuntempe por Esperanto ne estas favora, situacio, ke en Hungario multoj lernas Esperanton nur por akiri diplomon pli facile. La laborejoj ne postulas la fremdlingvo-uzon, nur la diplomon pri la sukcese finita lingvoekzameno de Esperanto. Tielmaniere vane okazas la instruo de la lingvo Esperanto, ĉar ne estas evoluo rilate la plimultiĝon de nombro de la lingvouzantoj de Esperanto, kaj nek la movado iras antaŭen. Regas ĝenerale la ideo: gajni pli da profito el la pli facile ellernebla lingvo kaj ne uzo de Esperanto. Ĉie, kie estas havantuloj de Esperanto-lingvodiplomoj en laborejoj, en lernejoj, ĉe kuracistoj, en la komerco, en ĉiu vivtereno – kie homo okupiĝas kun homoj – oni devus atesti, ke tie persono atestas Esperanton. Surskribu la laborejoj sur la pordoj nomkarto: ESPERANTO UZATA!

En Nederlando, dum mia tiea 1969 jara vizito, mi vidis tiun en la Policejo - kiam kiel fremdulino mi devis anonci min, kie kaj ĉe kiu mi loĝas dum mia turistcela unumonata

nederlanda restado, kaj krom tiu en la Poŝto-direktorejo, kie laboris miaj esperantistaj geamikoj.

Ekzemple en urbo Miskolc en bankoj, ĉe Policdirektorejo, doganejo... ktp tre multe laboras tiuj, ĉefe gejunuloj, kiuj ekzameniĝis en Esperanto/kaj nur al la baldaŭa diplomakiro/.

Mi prilaborigus pere de ili siajn laborejajn fakleĝojn laŭ kiuj ili faras sian laboron, sendepende de tiu fakto, ke la leĝoj ofte ŝanĝiĝas. Se iuj volas doktoriĝi el Esperanto, ilia diplomalabor-temo estu propralaborejaj laborleĝoj prilaborotaj per fakesprimoj. Certas, ke ĉimaniere ilia lingva pluedukado certigota estus kaj tiu utilis ankaŭ el vidpunkto de pluevoluo de fakliteraturo de lingvo Esperanto.

Ĉar laŭ mia opinio plenkreskante ellerni Esperanton kaj poste neokupiĝi pri ĝi (la homo havas rajton) pro nura financa-profitakira vidpunkto, estas malhonesto ago ankoraŭ ankaŭ tiam, se ĝin kaŭzas la hodiaŭa kapitalista vidpunkto.

Se la instruon de Esperanto ni enkondukos en la bazlernejojn kiel fundamentigon de la pli malfruaj lingvoinstruoj, poste en mezlernejoj ni donos la mezgradan instruon de Esperanto el la nacia- kaj mondliteraturo kaj movadhistorio de Esperanto, poste en la universitatoj kaj ĉeflernejoj ni certigas, ke la studento esperantlingve povu ellerni la fakon kaj sciencon literaturon por supergrade ekzameni el ĝi, tiam ni atingos la nivelon de la multloke kaj multfoje pridiskutita angla lingvo.

Tiu ĉi metodo estus la konvena instrusistemo de nia lingva instrua koncepto! Ĉi tiun devus trapensi ĉiu esperantista pedagogo! Laŭ mi nur tielmaniere povos atingi esperanto la necesan rekonon Esperanto, kaj ĝuste la samon, kiun la lingvo angla. Se ni forrestas kaj ne agos same, la lingvo angla vere povos iĝi helplingvo de Eŭropo, kiel siatempe la „lingua franca”. Ĉar la angla lingvo estas instruata de bazlernejo ĝis universitato, sed oni komencas instrui ĝin jam ankaŭ en la infanvartejoj, de la kvar-kvina jaraĝo de la infanoj. Mi konsentas pri opinio de László Gados, laŭ kio la lingvaj kaj ceteraj ŝanĝoj, rekonaj bezonas tempon. Ĉi tie mi mencias pri kiu ĝis nun eble ankaŭ vi ne aŭdis. Kiom multe da tempo bezonis la homaro por la eŭropa rekono de apliko de arabaj numeroj. Tiam ”la senindulga lukto daŭris dum la 12-15-aj jarcentoj...”

Esperanto havas ankoraŭ nun 120 jarojn. Tamen ni esperas, la lukto por akceptiĝo de Esperanto ne iĝos tiel longdaŭra.

La esperantistoj nomas sin pri la vorto espero. Ni esperas, ke ĉi bela, orelkaresa lingvo iĝos iam oficiala perantlingvo de la mondo kaj ne nur de EU.

Sed, ĝis tiam ni devos multe fini: influi, krei, pliigi la aron de konoj, ke Esperantio prosperiĝu kaj ni ne forgesu vortojn de Viktor Hugo, kiujn citis ankaŭ Georges Kersaudy en sia citita franclingva verko:

„UTOPIO ESTAS REALO DE MORGAŬO.”

Adrienne Pásztor

**La 2008-a, estas
Jaro ankaŭ de la
LINGVO – LINGVOJ**

Eseo

-daŭrigo –

-Parto II-a -

La plej grandsignifaj lingvofamilioj de la mondo estas:

La multspecajn lingvojn, laŭ ties proprecoj, oni rigardas kiel klasifikitajn en grupojn, lingvofamiliojn. Laŭ la Nova Hungara Leksikono, eldonita en 1961, la plej grandsignifaj lingvofamilioj de la mondo estas:

La Hindeŭropaj-lingvoj (Hinda, Persa, Armena, Greka, Albana, Novlatina, Kelta, Germana, Baltaj-lingvoj, Slavaj-lingvoj), Uralaj-lingvoj (Finn-ugra, Samojeda), Altajaj-lingvoj (Mandju – Tungusa, Mongola, Turka, Oguza, Kipĉaka, Ĉuvaŝa, Jakuta, Tatara, korea, Japanaj), Kaŭkazaj lingvoj (Kartvela, Abhaz-adigea, Veinaha, Dagestana) Dravida-lingvoj (Tamil-Kuruka, Kannara, Telugua), Tibet-Ĉina-lingvoj (Ĉina-Thaja, tibeta-Burma), Austroaziaj-lingvoj (Khasinokobara, Mon-Khmera, Munda), Aŭstroneziaj lingvoj (Indonezia, Polinezia,

Melanezia), Paleosiberiaj-lingvoj (Ĉukĉa, Burjaka, Kamĉadala, Fukagura, Ĉuvaŝa), Semita-Hamita lingvoj (*Semita:lingvoj*. Araba, Hebrea, Etiopa), *Hamita lingvoj*: Berbera, Tuarega, Kuŝita, somala, Galla ktp), Bantuaj –lingvoj (Suahela, Zulu, Ruanda, Asanta...),Sudanaj-lingvoj (Hausa...),Khojnaj-lingvoj (eskimoa, Aleuta), Indianaj lingvoj (Algokina, Irokeza, Siua, Ubo-Azteka, Majao), Aŭstraliaj-lingvoj.

Se ni parolas pri lingvoj, ni parolas ne nur pri la nacilingvoj, sed ankaŭ pri la dialaktoj, ĵargonoj, slangoj. Nun jam ni povas paroli inter aliaj pri: lingvoj de la biblio, filozofio, politiko, literaturo, (ene de ĝi pri lingvoj de la poezio, kritiko kaj traduko), pri la meteologio, sporto, sciencoj, teĥniko, teatro, ĵurnalismo kaj mi povus vicigi multe plu.

Inter miaj legaĵoj mi renkontis ankaŭ tiujn historietojn, en kiuj priskribitaj estis; ke iuj homoj konis lingvojn de la bestoj. Ĉi tiuj estis fabeloj, sed estis tiel interesaj, ke ni povas akcepti ilin veraj, ĉar la vivo havas eksterordinarajn eventojn, kiuj naskas esceptajn solvojn. Ĉi tiaj historietoj estis kolektitaj de la hungara popolfabelkolektanto kaj prilaboranto Benedek Elek, kiuj pritemas pri konoj de lingvoj de la serpento, urso kaj la birdoj. Aŭ, jen historieto de la siuoj: lupu grego nutris iun indianon dum tuta vintro, kiam li ne povis reiri al sia tribo pro la neatendite subfalinta neĝo. Kaj simila historieto estas la historieto de Maugli – filo de

NNNooorrrdddhhhuuunnnggaaarriiia aallInnnfffooorrrmmmo oo18

ĝangalo. Ankaŭ lupoj nutris Romulon kaj Remuson, fonditojn de Romo. Ĉi historietoj sugestas se homo kaj besto reciproke sukcesas ellerni la lingvon de la alia, la komunikado povas esti sukcesa ankaŭ inter la homoj, eĉ se la diferencoj estas grandaj.

Sed la mondo de la homoj, estas pli komplika, ol tiu de la bestoj. Ĉi tie denove antaŭeniĝas la kono, neceso de plurlingvoj. Tiu fakto, - kiome necesas la scio de almenaŭ du lingvoj kaj pluse de Esperanto, montras la sekva kazo:

Per miaj bazgrada angla kaj kelkvorta germana lingvoscio + supergrada esperanto-lingvoscio, mi funkciis tri tagojn kiel interpretisto magazena je peto de la tieuloj, post la de mi farita helpo de la vendistoj – en urbo Split (Kroatio) en majo de 1973. La monsumo ricevita pro mia ĉi helpo; egalas per mia tiama hungaria unu monata salajro. Post fino de la interpretado la vendistoj demandis min, kiun lingvon mi uzis kiel trian. Je mencio de esperanto, ili diris mire: ili ne pensintus, ke Esperanto povas funkcii tiel bone, kiel komercista helplingvo.

Jen, ĉi kazo estis por mi la plej manprenebla rezulto de mia lingvoscio, kaj ĝis nun unu plej interesa travivaĵo. Sed, tion ĉiu akceptas, ke unu homo ne povas ellerni ĉiun lingvon de la mondo. Ne ĉiuj povas komprenigi sin per ĉiu naciato, kvankam ankaŭ en nia epoko vivas homoj multlingvojn konataj.

Problemon de la multlingvismo en la antikva epoko konis jam ankaŭ la asiroj, judoj. Pri tiu temas historieto de Turo de Babelo. La babelanoj pensis, ke la forresto de finkonstruo de turo pro la lingvakonfuzo babelo, estas puno de Dio. Ili provis solvi la situacion, en intereso de la kulturo, la sciencoj, en kortegoj de la reĝoj, regnestroj, kaj la plibonigo de la tiamaj komercaj rilatoj. Estis paralele uzitaj lingvoj. Unu kulturan, la alian komercan celon servis. Tiuj-ĉi estis: la ŝumera-akada, pli malfrue la klasikalatina-vulgarlatina, sed funkciis ankaŭ ties miksaĵlingvoj, kiu estis ekzemple la prahebrea-arama kaj la greka-latina, kiel ni povas legi pri tiu en la libro, titolita „Gvidlibro por Supera Ekzameno (1966). En la mondo multaj scienculoj okupiĝis kaj okupiĝas ankaŭ nuntempe pri la problemo de la multlingvismo. Ĝis nun krejiĝis ĉ. 120 planlingvoj. Inter ili estas ekzemple la kreo de la mondfama matematikisto Bólyai János (Johano Bojai) kaj eĉ de ok hungaraj sciencistoj (Gvidlibro...).

Doktoro L.L.Zamenhof pola okulkuracisto ekirigis sian planlingvon en 1887. Tiu iĝis viva, evolukapabla, lingvo, uzata jam de 121 jaroj. Li rezignis sian aŭtorajton kaj li transdonis sian verkon al la mondo. La vortostoko kaj gramatiko de Esperanto estas konstruita al el la okcidenteŭropaj lingvoj kun miksaĵo de slavaj-vortoj. Ĝia logika gramatiko estas facile ellernebla, kaj tiu-ĉi estas avantaĝo en la lingvolernado.

Sed, kiel ankaŭ ĉe aliaj lingvoj, ankaŭ – ĉe tiu ĉi, - la tempodaŭro de ellerno de ĉi lingvo dependas multe pro la plenumkapablo de la individuo, de la lingvolernadmetodoj, persona pretendemo kaj de tempodaŭro de ĉiutaga lernado, ekzerco.

Alia avantaĝo de ĝia uzo estas: se ĝia ellerno okazas gepatralingvoniovele, la konversacipartnero povas esti ajna: Afrikanulo, Japano, Germano, Buŝmano, aŭ Anglo, mi tamen tiel sentas: kvazaŭ ni parolus inter ni per mia gepatrolingvo. Kaj ĉi tiu sento estas vera ambaŭflanke. Ĉi tiu sento estas grandioza. Ja, mi ne konas ĉiun el la ekzemple notitaj lingvoj, tamen mi povas kompreni ilin kaj komprenigi min: sendepende de tiu, kiun nacilingvanon mi alparolas. Ĉi lingvo estas de tiuj, kiuj ellernas kaj uzas. Foje, unu mia afrika korespondanto skribis ke ili vidas Esperanton, kiel lingvon de la libereco, kontraŭ tiu fakto, ke en Esperanto nenio ekzistas el la vortotrezoro de afrikaj lingvoj.

La disvastiĝon de Esperanto montras, ke plurmiloj da homoj parolas ĝin en 119 landoj de la Tero, kaj Esperanto-Asocio funkcias en 99 landoj.

Regulaj radiodissendoj okazas el: Pekino, Vatikano, Romo, Varsovio, Vieno, Tallino, kaj el Soulo.

NNNooorrrddhhhuuunnnggaaarriiia aaIIInnnfffooorrrmmmo oo19

Lingvo de la malgranda popolo, ofte trasferas, ke devprenas kaj fandas en sian propran lingvon: la nomon de nocioj, aron da esprimoj transprenitajn el grandaj lingvoj (Ekz: el la angla) sen renovigo de propra lingvo, aŭ sen ilia transformo al la propra lingvo. Bedaŭrinde, la pli granda disvastiĝo de ĉi vortoj, povas konduki al la formorto de la malgrandaj nocioj, lingvoj. Konsidere al ĉi tiu danĝersituacio, la Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj proklami la jaron 2008 Internacia Jaro de Lingvoj, kaj konfidis al Unesko la taskon kunordigi la agadon por la Jaro. Ties Ĝenerala Direktoro, *Koichiro Matsuura* skizis en mesaĝo la taskojn de la Jaro. . Lia mesaĝo interalie enhavas la jenan:

„Tamen, en la daŭro de kelkaj generacioj, pli ol 50% el la 7000 lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. Nun estas uzata malpli ol kvarono el ili en la lernejoj kaj ciberspaco, kaj la plimulton oni uzas nur sporade. Miloj da lingvoj -- malgraŭ tio ke ĉiu estas regata de homgrupo kiu ĝin uzas kiel ĉiutagan komunikilon -- forestas el la eduksistemoj, komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj gxenerale el la publika sfero.

Urgas agi. Kiel? Per la kuraĝigo kaj prilaboro de lingvopolitikoj ebligantaj al ĉiu lingvokomunumo la uzon de ties gepatra lingvo kiel eble plej vaste kaj ofte, ankaŭ en la edukado, apud la reĝo de iu nacia aŭ regiona lingvo kaj iu internacia lingvo. Ankaŭ kuraĝigante la parolantojn de regantaj lingvoj regi alian nacian aŭ regionan lingvon kaj unu aŭ du internaciajn lingvojn. Nur se plurlingvismo estos plene akceptita, ĉiuj lingvoj povos trovi sian lokon en nia tutmondiĝinta mondo.

Tial Unesko invitas la registarojn, UN-organojn, organizaĵojn de la civila socio, edukajn instituciojn, asociojn de profesiuloj kaj ĉiujn aliajn koncernatojn stimuli la respekton, antaŭenigon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj, aparte de tiuj endanĝerigitaj, en ĉiuj situacioj de la individua kaj kolektiva vivoj.”

Jes, laŭ mi oni devus fari pli multajn tradukojn el la nacilingvoj al la grandaj – kaj al la perantlingvoj. Ĉi traduko bele progresas rilate Esperanton. Elformiĝis kaj daŭre pluimultiĝas ĝia propra literaturo, kaj daŭre kreskas la nombro de esperantigoj el la nacilingvoj. Veraj artverkoj naskiĝas, kiuj meritas la fierecon plenrajte, de la lingvon parolantoj. Jes, oni devas tiel efiki, ke ankaŭ parolantoj de la grandaj- aŭ regantaj lingvoj, kaj ankaŭ ties uzantoj ellernu pli da lingvoj krom la siaj. Laŭ mi, la nialanda lingvopolitiko bonis dum la 20-a jc. Sed pr. Ekde 20 jaroj la situacio ŝanĝiĝas damaĝe al nia nacilingvo.

La diversaj landoj donas nur anglalingvajn informojn, eĉ ankaŭ la faklitaraturo de diversaj teĥnikaj tekstoj, aperas nur angle. Tiel la lingvo angla praktikas premon sur la hungaran lingvon kaj ankaŭ sur la por ellerni elekteleblajn lingvojn ĉar laŭ influo de la aplikita lingvopolitiko, la plej multo volas lerni nur angle, italan, hispanan, germanan, rusan esperantan ne.

Se ni studas: kiu granda lingvo (kiel reganta lingvo) taŭgus al la lingva-gvidantaro, pri kiu parolas la ĉefdirektoro de UNESCO en sia mesaĝo, ni devas vidi denove la danĝeron de la lingva imperiismo, kvankam la anoncita celfikso havas ne ĉi intencon.

(Rev: László Gados)

Konversacia vortaro Esperanto-Albana

FJALOR BASHKEBISEDUES ESPERANTO-SHQIP

Demandoj

Pyetje

Kiel vi fartas? Si jeni?

Dankon, bone kaj vi? *Faleminderit, mirë, po ju?*

Cxu vi komprenas? A kuptoni?

Mi (ne) komprenas. Une (*nuk*) kuptoj.

Bonvolu skribi tion *Ju lutem shkruajeni këtë.*

Kiel vi elparolas ĝin? *Si e shqiptoni ju atë?*

Parolu malrapide *Fol ngadalë.*

Mi petas *Ju lutem.*

Dankon *Faleminderit.*

Jes/Ne *Po/Jo*

Mi (ne) scias Une (*nuk*) e di.

Pardonu *Më falni.*

En ordo/bone *Në rregull/mirë.*

Mi ĝojas *Gëzohem.*

Mi estas feliĉa *Jam i lumtur.*

Mi bedaŭras *Më vjen keq.*

Agrablan vojaĝon *Udhëtim të këndshëm.*

Mia nomo estas... *Emri im është...*

Kio estas via nomo? *Cili është emri juaj?*

Mi iras al *Po shkoj te*

Kie estas hotelo/kafejo? *Ku është hoteli/kafeneja?*

En la urbo Në qytet

Turisma oficejo Zyra turistike

mapo	<i>harta</i>
prospekto	<i>fletëpalosje</i>
preĝejo	<i>kisha</i>
katedralo	<i>katedralja</i>
monaĥejo	<i>manastiri</i>
muzeo	<i>muzeu</i>
teatro	<i>teatri</i>
informejo	<i>zyra e informacionit</i>
policejo	<i>stacioni i policisë</i>
policano	<i>polic</i>
doganejo	<i>dogana</i>
pasporto	<i>pasaporta</i>
fremda valuto	<i>valutë e huaj</i>
banko	<i>banka</i>
monŝanĝejo	<i>këmbimorja e parave</i>
poŝtoficejo	<i>zyra postare</i>
letero/bildkarto	<i>letër/kartolinë</i>
adreso	<i>adresa</i>
per aviadilo	<i>me avion</i>
poŝtmarko	<i>pullë postare</i>
enlando/eksterlando	<i>brenda vendit/jashtë vendit</i>
pakaĵo	<i>pako</i>

telefonbudo	<i>kabinë telefonike</i>
telefonkarto	<i>kartë telefonike</i>
Vojaĝo	<i>udhëtim</i>
vojaĝsako	<i>çantë shpine</i>
taksio/autobuso/tramo	<i>taksi/autobuz/tramvaj</i>
aviadilo	<i>avion</i>
trajno	<i>tren</i>
ŝipo, pramo	<i>anie, traĝet</i>
ŝiphaveno, pramhaveno	<i>port detar, port traĝeti</i>
bus-haltejo	<i>vend-ndalesë autobuzi</i>
fervoja stacidomo	<i>stacion treni</i>
bus-stacidomo	<i>stacion autobuzi</i>
Kiam alvenas la buso/trajno?	<i>Kur vjen autobuzi/ treni?</i>
Kiam forveturos/forflugos?	<i>Kur nisët/fluturon?</i>
Mi petas bileton al	<i>Ju lutem një biletë për..</i>
Kiom kostas la bileto?	<i>Sa kushton bileta?</i>
Ĉu tiu buso veturas al...	<i>A shkon ky autobuz për..</i>
Kiam ĝi atingos celon?	<i>Kur mbërrin ai në destinacion?</i>
Je la dekdua (12a) horo	<i>Në orën dymbëdhjetë(12)</i>
Kie mi devas ŝanĝi la buson?	<i>Ku duhet ta ndërroj autobuzin?</i>
Kie estas benzinstacio?	<i>Ku është stacioni i benzinës?</i>
benzin/motoroleo	<i>benzinë/ vaj motori</i>
aŭtoriparejo	<i>vendriparimi veturash</i>
aŭtolavejo	<i>vendlarje veturash</i>

Mi petas, riparu tion. *Ju lutem, ndreqeni këtë*
 enirejo/elirejo *hyrje/ dalje*
 atentu *kujdes*
 (mal)permesata *(e ndaluar) e lejuar*
 Kiu estas la vojo al *cila është rruga për*
 Kiom longa estas la vojo ĝis.. *Sa zgjat rruga për..*
 Ĉu tiu strato kondukas al..? *A të shpie kjo rrugë për..?*
 horo/minuto/sekundo *orë/ minutë/sekondë*
 kilomentro/mejlo *kilometër/milje*
 Ĉu oni rajtas ĉi tie parki? *A lejohet parkimi këtu?*
 Ĉu oni rajtas ĉi tie kampi? *A lejohet të fushojmë këtu?*
 Kie estas kuracisto/apoteko? *Ku është mjeku/ farmacia?*
 hospitalo *spitali*
 Mi havas doloron/vundon *Kam dhimbje/plagë*
 Mi bezonas *Kam nevojë*
 urĝas *Nxitoj*
 Kiam ĝi estos preta? *Kur është gati?*
 Hotelo/restoracio *hotel/restorant*
 Ĉu vi havas ĉambron? *A keni një dhomë?*
 banejo/kun necesejo *Banjo/me nevojto*
 vištuko/sapo *peshqir/sapun*
 fenestro/pordo/ŝlosilo *dritare/derë/ĉelës*
 Mi restos kvar tagojn *Do rri katër ditë*

Kiom kostas la ĉambro?	<i>Sa kushton dhoma?</i>
Mi forvojaĝos hodiaŭ	<i>Do iki sot</i>
Morgaŭ, vespere	<i>nesër, në mbremje</i>
Matenmanĝo	<i>mengjes</i>
Tagmanĝo	<i>drekë</i>
vespermanĝo	<i>darkë</i>
kelnero	<i>kamarier</i>
menuo	<i>menu</i>

manĝaĵo *ushqim*

Bonvolu alporti	<i>Ju lutem më sillni</i>
supo/legomo	<i>supë/perime</i>
terpomo/rizo	<i>patate/oriz</i>
fiŝo/viandaĵo	<i>peshk/mish</i>
boligita/fritita/rostita	<i>të zier/të fërguar/të pjekur</i>
butero/fromaĝo	<i>gjalpë/djathë</i>
kokidaĵo	<i>mish pule</i>
porkaĵo	<i>mish derri</i>
salato	<i>sallatë</i>
sandviĉo	<i>sandviç</i>
ŝafidaĵo	<i>mish qengji</i>
bovaĵo, bovidaĵo	<i>mish lope, mish viçi</i>
tomato	<i>domate</i>

glaciaĵo	<i>akullore</i>
kuko	<i>ĉembĉlsirĉ</i>
pano	<i>bukĉ</i>
frukto/fruktosuko	frut/lĉng frutash

trinkaĵo ***piĵe***

kafo kun lakto	<i>kafe me qumĉsht</i>
kafo kun kremo	<i>kafe me kajmak</i>
teo/citrono	<i>ĉaj/limon</i>
akvo/biero/vino	<i>ujĉ/birrĉ/verĉ</i>
minerala akvo	<i>ujĉ mineral</i>
ĉampano	<i>shampanjĉ</i>
lakto	<i>qumĉsht</i>
suko	<i>lĉng frutash</i>

Bonvolu la fakturon *Ju lutem, faturĉn*

Kie estas butikoj? ***Ku ĉshtĉ dyqani?***

Ĉu vi havas...?	<i>A keni..?</i>
Mi deziras	<i>Dĉshiroj</i>
Tio (ne) plaĉas al mi	<i>Kjo(nuk) mĉ pĉlqen</i>
Kiom ĝi kostas?	<i>Sa kushton?</i>
Tio estas multekosta/malmultekosta	<i>Kushton shtrĉnjtĉ/lirĉ</i>
(Ne) estas bela vetero	<i>(Nuk) ĉshtĉ kohĉ e bukur</i>
Ĉu mi rajtas inviti vin?	<i>A mund t'ju ftoj?</i>

Venu/ni iru *Hajde/ shkojmë*
 Çu vi deziras trinki ion? *A don të pish diçka?*
 Dankon, mi prenos bieron. *Faleminderit, do marr birra*
 Je via sano *Shendeti juaj*

Numeroj Numrat

1 Unu një
 11 dekunu njëmbëdhjetë
 21 dudekunu njëzete një
 2 du dy
 12 dekdu dymbëdhjetë
 22 dudekdu njëzetedy
 3 tri tre
 13 dektri trembëdhjetë
 23 dudektri njëzetetre
 4 kvar katër
 14 dek kvar katërbëdhjetë
 24 dudek kvar njëzete katër
 5 kvin pesë
 15 dek kvin pesëmbëdhjetë
 25 dudek kvin njëzetepestë
 6 ses gjashtë
 16 dek ses gjashtëmbëdhjetë

26 dudek ses njëzetegjashtë

7 sep shtatë

17 dek sep shtatëmbëdhjetë

27 dudek sep njëzeteshtatë

8 ok tetë

18 dek ok tetëmbëdhjetë

28 dudek ok njëzetetë

9 naux nëntë

19 dek naux nëntëmbëdhjetë

29 dudek naux njëzetennëntë

10 dek dhjetë

20 de dek njëzetë

30 tri dek tridhjetë

100 cent njëqind

1000 mil njëmijë

Korelativaj vortoj

kiu kush	Tiu Ai	iu dikush	ĉiu gjithëkush	neniu askush
kio çfarë	tio ajo	io diçka	ĉio gjithëçka	nenio asgjë
kie ku	tie atje	ie askund	ĉie gjithëkund	nenie askund
kiam kur	tiam atëhere	iam dikur	Ĉiam gjithnjë	neniam asnjëherë
kia qysh	tia e tillë	ia - njëfarësoj	ĉia gjithëfarësoj	nenia asnjëfarësoj
kiel	tiel	iel - në një farë	ĉiel gjithësesi	neniel - në asnjë

si	kështu	mënyre		mënyrë
kiom	tiom	iom	çiom	neniom
sa	aq	pak	sa të duash	aspak
kial	tial	ial	çial	nenial
pse	prandaj	për ndonjë shkak	për çdo shkak	për asnjë shkak
Kies	ties	ies	çies	nenies
I kujt	i tyre	i dikujt	i gjithëkujt	i askujt

Jarsezonoj

stinët

printempo *pranvera*

somero *vera*

aÿtuno *vjeshta*
vintro *dimri*

Semajno

java

lundo *e hëna*

mardo *e marta*

merkredo *e mërkura*

ÿaÿdo *e enjta*

vendredo *e premtja*

sabato *e shtuna*

dimanço *e diela*

Partoj de la tago pjesët e ditës

aÿroro *agimi*

mateno *mengjesi*

antaÿtagmezo *paraditja*

tagmezo *mesdita*

posttagmezo *pasditja*

vespero *mbremja*

noktomezo *mesnata*

antaŭhierau *pardje*
hierau *dje*

hodiaŭ *sot*

morgaŭ *nesër*

postmorgaŭ *pasnesër*

Monatoj muajt

januaro *janar*

februaro *shkurt*

marto *mars*

aprilo *prill*

majo *maj*

junio *qershor*

julio *korrik*

aŭgusto *gusht*

septembro *shtator*

oktobro *tetor*

novembro *nentor*

decembro *dhjetor*

Literoj kaj vortoj albanaj en la angla

Litero	La vorto en la angla	La Koresponda vorto en la albana
A	Uncle	Ungj
B	Bull	Bull
C	Tsar	Car
Ç	Cherry	Qershi
D	Door	Derë
DH	That	Atë
E	Energy	Energji
Ë	Per	Për
F	Flock	Flok
G	Gurgle	Gurgulloj
GJ	Legion	Legjion
H	H unger	Hangër
I	Languish	Lëngo
J	I am	Jam
K	Dark	Darkë

L	Light	I lehtë
LL	Pull	Tërheq
M	Major	Madhor
N	Night	Natë
NJ	Oni on	Qepë
O	Ocean	Oqean
P	Plough	Plug
Q	Stockyard	Vathë
R	Desire	Dëshirë
RR	Narrow	I ngushtë
S	Super	Sipër
SH	Shawl	Shall
T	T runk	Trung
TH	Three	Tre
U	Loom	Tezgjah
V	Vase	Vazo
X	Adze	Sqepar
XH	Jacket	Xhaketë

Y	Étude (in French)	Studim
Z	Zeal	Zell
ZH	Vision	Fushpamje

Postnoto: Pli da vortoj troveblas se oni konsideras la malnovan Anglan

Poshtë shënim: Më shumë gjenden po t'i drejtoheni Anglishtes së vjetër.

El la leteroj

- Estimata sinjoro,
mi preparas prelegon por la esperantologia konferenco dum UK en Roterdamo. Mi bezonas por ghi korelativan tabelon en la albana lingvo. Mi ne trovis ghin en la interreto, tial mi ggentile petas vin skribi al mi albanajn tradukojn de la subaj vortoj (au enskribon en la aldonan tabelon). Mi kore antaŭdankas al vi. Sincere salutas Vera Barandovská-Frank

Respondo

Esperanto	Albane	Prononcigxo
------------------	---------------	--------------------

kiu	kush	kusx
Tiu	ai	ai
chiu	kushdo	kusxdo
iu	dikush	dikusx
neniu	askush	askusx
kio	çfarë	cxfare
tio	ay	ai
chio	çdogjë	cxdogxe
io	diçka	dicxka
nenio	asgjë	asgxe
kia	çsoj	cxsoj
tia	i tillë	i tile

chia	çfaredosoj	cxfaredosoj
ia	njëfarësoj	njefarsoj
nenia	asnjwsoj	asnjesoj

kies	i kujt	i kujt
ties	i tij	i tij
chies	i gjithkujt	i gxithkujt
ies	i dikujt	i dikujt
neniesi	askujt	i askujt

kiel	si	si
tiel	kështu	kesxtu
chiel	gjithësesi	gxithsesi
iel	diquysh	dikjish
neniel	asses	asses

kiom	sa	sa
tiom	aq	aq
chiom	sado	sado
iom	pak	pak
neniom		aspak aspak

kie	ku	ku
tie	aty	ati
chie	kudo	kudo
ie	diku	diku
nenie	askund	askund

kien	për ku	per ku
tien	për andej	per andej
chien	për kudo	per kudo
ien	dikah	dikah
nenien	për askund	per askund

kiam	kur	kur
tiam	atëhere	atehere
chiam	gjithnjë	gxithnje
iam	dikur	dikur
neniam	asnjëherë	asnjehere

kial	pse	pse
tial	sepse	sepse
chial	për çdo arsye	per cxdo arsye
ial	për ndonjë arsye	per ndonje arsye
nenial	për asnjë arsye	per asnje arsye

cxi tiu ky, kjo ky kjo
Cxi tio ky, kjo ky kjo same kiel por vivuloj

- **Estimata,**

Saluton.

Kiel vi fartas ?

C'u vi fartas bone ?

Mi esperas vi fartas bone kaj c'io estas bona por vi.

G'i estas varma . c'u ne ?

Nepalo estas respubliko !

Bondezirante , danke,

Navin Shrestha,

GPO Box 11753,

Kathmandu,

Nepal.

- Altestimata Profesoro.

mi dankas al vi kore pro la bulteno ke mi rivevis. Kiam vi povas sendu al mi informojn.

Cxu vi povas diri al mi kie mi povas trovi Kurso de Esperanta/albana Lingvo, kaj kie estas la esperantistoj en Albanio? Miaj gelerantoj kiu jam konas Esperanton sufcixe (jam eltenis la unuan gradan ekzamenon povas kopodi lerni ankaux la albanan (kiel komentantoj)

En auxgusto mi foriros al Prishtino, mi deziras alveni al Korfu, poste Sarandë , Tirana kaj Prishtino.

Mi dankas al vi de nove , se mi eraras korektu miajn erarojn !

Antonio, Italio

Kara Bardhyl,

- Koregan dankon por la bulteno kaj aliaj sendajhoj. Mi chiam ghojas audi de vi. Ofte venas esperantistoj chi-tie kaj mi rehasas E-o-lunchon kun amikinoj kiuj interesighas pri la afero. Bedaurinde mi ne eblas partopreni la UK chi-jare, char venos granda grupo de pilgrimantoj ghis la fino de julio.

Plej verŝajne mi revenos al Vlora venontsomere au almenau vizitos la amikojn en Albanio.

Mi deziras chion bonan al vi kaj viaj familianoj kaj kore salutas vin

Martha el Israelio

Impresoj de fremdaj esperantistoj pri Albanio

Letero de samideano Wiliam R. Harmon en la jaro 1992

..Mi tre simpatias kun la homoj en la landoj kiuj nun transiras el socialisma centra planado kaj sxangxigxas al merkat-centra ekonomio. Tiu sxangxo havas kelkajn gravajn konsekvencojn: unue, la antauxa rialto inter la konsumanto kaj la sxtato malaperas kaj la rialto poste estos inter la privataj komercoj kaj la konsumanto. Tio rezultigas bonon kaj malbonon. Bonon en tio ke eventuale la konsumanto havas pli bonan elekton pri varoj kaj espereble pro konkurencado ne tro altajn prezojn. Malbonon, cxar estas tuj perdita la avantaĝo de grandnombra produktado je pli malalta kosto. Tamen estas ankaux aliaj kontrauxpezoj: la perdo de centra produktado ne necese pliu altigas prezojn, cxar povus esti ke de la sola produkta loko al la konsumantoj la kosto de transporto almetis konsiderindan altigxon. Tio multe pli okazus en vasta lando kiel Rusujo, ekzemple, ol en relative kompakta lando kiel Albanio.

Kio sendube rezultos, ankaux, estas invado de eksterlanda kapitalo. Mi tre esperas, ke vi ne forvendos viajn merkatojn al Germanaj aux Japanaj grandkompanioj. La albanoj prefere retenu la profitojn en Albanio, lauxeble, por subteni la koston de sociaj servoj ktp. Mi havis longan diskutadon kun samideano en pollando, en kiu mi sxokis lin dufoje. La unua sxoko venis kiam li plendis, ke ege mankas kapablaj administrantoj en la registaro, precipe cxe la vojevoda /province nivelo, kaj mi respondis, ke mi jxus antaux dek minutoj auxdis lin diri al iu alia, tre fiere, ke ili tute forpelis "cxium komuniston" el la registaro, kaj mi devas demandi min, cxu ne inter tiuj trovigxid gxuste la sperton kaj kapablon kiun ili bezonas? Estus pli facile, mi diris al li, reeduki tiujn homojn politike ol krei dekomence tutan klason de administrantoj el amatoroj. En cxiu "okcidenta" lando oni rajtas sxangxi la subtenon al politika partio tre simple: oni cxesas sendi la monon al unu, kaj komencas sendi la kotizon al alia. Kial ne fari same cxe la antauxaj membroj de la kompartio, se ili ne estis iuspecaj hombucxistoj aux trompuloj?

La dua sxoko kiun mi donis al li, venis kiam mi sugestis ke ili devus kiel eble provi reteni la bonajn flankojn de la antauxa socialisma socio: ekzemple, la sanservojn, la emfazo de kulturo, la bona eduka sistemo, la publika posedo de la bazaj bezonajxoj de la vivo kiel akvo, elektriĝo, gaso. Mi sugestis al li, ke se la nova registaro privatigas tiujn bazajn komercojn, ili deprenos de la popolo bonegan bazon sur kiu konstrui la novan ekonomion. Homoj devus ne devi perdi multe da tempo priluktante la hejton, la akvon, ktp. Ili devus esti liberaj de tiaj gxenoj por plene produkti. Mi menciis al li ke mi, kapitalisto, tamen konscias ke komunismo kolapsis cxefe cxar homoj ankoraux ne estas angxeloj, kaj ne estas sindoneme kunlabori tiom kiom postulis la komunisma teorio. Ecx centra planado por limigitaj eroj de ekonomio povas esti utila, se limigita al tiuj varoj kiuj povas pliefike produktigxi unuloke sen ekstera konkurencado

William R. Harmon

13 julio 1992

Letero de la franca geparo Louise kaj Jean Marin

Antaux precise 20 jaroj, en 1988, mi vizitis Albanion kun mia edzino kaj grupo de francaj turistoj.

Oni avertis nin ke tute ne eblus renkonti albanajn esperantistojn. Malgraux tio ni sukcesis trovi adreson de samideano en Durres.

Alvenante en Durres kun la grupo, ni avertis la albanan cxicxeronon ke ni ne vespermangxos. Li propones telefoni al tiu persono kaj revenis dirante "Sxi ne cxeestas, sxi libertempas".

Tamen, cxar ni bone konis la eks' socialistajn" landojn, ni ne fidis. Ni foriris duonkasxe, prenis tramon, petis al la sxoforo haltigi nin apud la strato koncerna, eliris la tramon, pliserxis kaj fine trovis esperantistan familion kiu logxis sur la supra etagxo de la domo. Tie oni akceptis nin tre varme, elkore kaj entuziasme. La familianoj eble ne havis iun okazon gxistiam renkonti iun eksterlandanon. Ili donis al ni raregan brosxuron en Esperanto pri Skanderbeg. Poste ni renkontis la francan atasxeon cxe la ambasadejo en Tirana. Li ege miris kiam li vidis la libron kaj diris ke estus bone ke ni ftokopiu tiun ekzempleron en Parizo kaj sendi gxin al li.

Li intencis donaci gxin al la biblioteko de la fakultato en Tirana. Tion do ni faris, fakte en 10 ekzempleroj se mi bone memoras kaj sendis al li.

Kelkaj jaroj poste mi legis ke tiu brosxuro estis eble unu el la unuaj libroj eldonitaj de la albana Esperanto asocio.

Tiam mi pensis ke eble tiu eldono fontis en unu el la ekzemplero kiun ni fotokopiis.

Mi ankoraux memoras en kiu terura situacio estis Albanio tiutempe. Interalie mi memoras la multnombrajn "blokhaus" (malgrandaj izolitaj betonaj fortikajxoj kiu svarmis lauxlonge de cxiu vojo).

Ni neniam forgesos la varmegan Koran akcepton de niaj albanaj amikoj kaj gxojas ke nun ili fine gxuas liberecon.

Samideane kaj tutkore al niaj albanaj samideanoj.

Jean Marin

Cxerpita dum la UK 93 en Roterdamo, Julie 2008

Rakontoj

Impresoj el la UNMIK¹ -prizono

¹ UN- misio en Kosovo, establita tie ekde somero 1999



La auxoro la dua de maldekstre

Ili lacigxis pro sidado. Nek povas nun rilaksigxi ecx marsxante. Cxiu konsciite pri la alies marsxado. Neniu pro la propra marsxado. Sxajnicas ili gxuste al iaj eroditaj pingvenoj. Kurbigitaj pro la vaniteca pezo, siajn malrapidajn alpasxojn ili estigas pigrece kaj balancante. Ili aj sxuoj senlacxaj kvazaux mokas per siaj langoj elstarigitaj. La orangxeca cirklo cxirkauxiras akurate. La gardisto ekgapas nur por eskapi la fumon de propra cigaredo. Li trasercxas en la malnovajn tagjurnalojn por krucenigoj duone solvitaj.

La longdaxra sonorado okazas pli frue ol kutime. Dume la cirklo malestigas. La enprizonuloj revenigxas el la tagpromeno. Sen sportiva aktiveco ili jam estas pli depresivaj ol antaux la promenado. Ili malaperas en siajn cxambretojn malforte lumigitaj. Plimulto de ili ricevas kontrauxdepresivajn medikamentojn. La prizono ja estigxis granda hospitalo, nekonsciigxinta pri si mem. La direktoro, la gardistoj kaj la cetera dejxorantaro pro tio sentas sin pli trankvila. Ja la ekstera mondo ne estas la eventejo mem, cxar en la prizono apenaux okazas io. La enprizonuloj deziras distingi la tagojn unu disde la alia. Sensxangxe, mankas la tempofluo, malsxangxigxo estas ja la eterneco. Ili kapablas do elfari kion ajn nur por ke produktu eventojn. Tial, la prizonaj oficistoj devas ilin toleri por ke tenu sin trankvila, cxu ne?

Oni malsxaltis la lumon. Certe estas 11-00 horo. Tre bone. Mi eksaltis de la lito. Nun mi disponas pri 15 sekundoj (gxis oni ekfunkciigos la generatoron) por ke mi enmanigu mian skribajxon al la bona gardisto B. Li poste sendos gxin por publikigo en la gazetejon. Dum cxi tiu tempo ankaux la kamerao en la koridoro ne funkcios. Jen la gardisto B venis. Tre bone. Li respektis la donitan parolon. Li estas finstudinta en la fakultato de fiziko. Lia observanto, same gardisto, estas finstudinta en la fakultato de ekonomiko, dum la prizonestro finstudis nur en mezlernejo. Tio ja ne atestas ke la prizonestro estas malbona homo (kvankam li envere estas tia), nek atestas ke li estas dejxorinta en tiu posteno

ankaux dum la regado de Jugoslavio kaj Serbio (kvankam envere li estas farinta tion). Tio do estas atestajxo ke li estas humila dum la renkontigxoj kun internaciuloj en Prishtino². Li povus facile perdi sian postenon enkaze de malobeado. Cxar la burokratuloj de UNMIK-o ne sxatas la surprizojn. Tre facile ili povus rememori ke la prizonestro ne kompetentas pri la koncerna posteno...

La erodigan bruadon de la generatoro sufokigas la bruo de la televidilo. En cxiu cxambreto lumigas multkoloro po unu televidilo. La mondo venas en la prizonon tra televidilo. Gxi estas ia anstatauxigxo por la cxambreto fenestro. Ia anstatauxigxo por cxia klerigado aux laborposteno en la prizono. Futbalo, banalaj humuraj programeroj, videospotoj pli banalaj, telenoveloj, denove futbalo. ..

La enprizonuloj mangxas trifoje tage sen engagxinte sin per ia ajn intelektula aux fizika aktiveco. Neniu edukigxas nek korektigxas en la cxi specia prizono. Nur tiuj gxiste terurigitaj aux tiuj perfektigxintaj por la venonta krimo, ne plu revenos en la prizonon. La procento de la ripetigxintaj prizonuloj kreskas cxujare. Disdividite de la socio ili sin reduktigas en sia krimo. Sed disdividite de sia krimo (post elprizonigxo) la socio ne donas al ili ian oportunecon. Ili sentas sin revenintaj ne kiam enprizonigxas sed kiam elprizonigxas. La krimo postsekvas ilin (kvazaux por ke gxi mem reaperu).

Estas pli da novaj krimuloj ol la novaj krimoj. Preskaux cxiutage venas kelkiu novulo pro malnova tre konata krimajxo. Tio igas la ceterajn krimulojn sin senti kvazaux en la propra hejmo. Ili farigxas bonvenigantaj. Il montras al la jxusveninto ke post 72 horoj sekvos la dauxrigo de 30 tagoj; ke tie li cxagrenigxos, sed poste venos "duobloj", do pliajn 60 tagoj da antauxprizonigxo kaj poste li iel sin malstrecxigos. Per vocxo kiun la homo parolas kun si mem, la bonvenigantaj prizonuloj diros al li: ne enuigxu! La gastoprizonulo vidas ilin konfuzite ne sciante kiel reagi. Kutime lia okulo estas nigrigxinta kaj surkorpe oni konstatas sxveltajxojn. Evidentas ke la enketpolicio estas ekzercinte perforton tutlibere sur lin.

Anstataux enketadi, multaj enketpolicistoj elcxerpas la konfesajxojn pri la kulpo de la prizonuloj mem. La bandoj estas ja fonditaj cxiam de banditoj sed ankaux de la polico mem, devigante la prizonulojn akcepti diversajn neekzistantajn rilatojn kaj konjektojn. Poste la ekjugxado malfruigxas cxar mankas la materiaj konfesajxoj. Ju pli longe oni tenu ilin en la prizono des pli malfacile estas deklari senkulpaj la suspektitojn por ke elprizonigu ilin. La longdauxro de la antauxprizonigxo influas en la kulpigon kaj en la kondamnon de la suspektito. Valoran helpon donas ankaux la prokuratoroj. Ili prokrastigas la materion por plimildigi la akuzojn, aux por rezigni de ili. Tio dependas cxefe de la monsumo kiu estas defiinta ilin. Fine, se la jugxistoj tamen devas liberigi la akuzitojn (cxar kontrauxe estigxus skandalo), tiam oftigxas la vizitoj de la advokatoj per pli karaj monpostuloj (ankaux pli multe) strebantaj la kompletan liberigxon. Ili ja knaras antaux la definitiva sesio ke la akuzito liberigxos pro manko de pruvajxoj...

La plimulto de prizonuloj estas malricxa. Sur la orienta flanko de la prizono, el 30 prizonuloj, 26 estis senlaboruloj en la momento de la aresto. Kaj 21 el ili akuzigxis pro sxtelo aux forrabo. Neniu el ili akuzitis pro varoj je valoro pli ol 1000 euxroj. Unu estas sxtelinta kompensilon, aliulo du motorsegilojn...Ili estas sxtelintaj kelkiun iom pli ricxa ol

² Cxewfurbo de Kosovo

si mem, sed tamen malricxa. Certe la ricxulojn oni malprobablas forsxteli, cxar il havas korpogardistojn, kameraojn, sensorojn. Cxi prizonuloj gxenerale ne havas eblecon pagi advokaton. Sed ankaux la advokatoj prezentataj promesas ilin neeblajxojn. La advokatoj sin kondutas kun la prizonuloj- klientoj kiel la politikistoj kun la popolo. Kelkaj el ili, pro la longdauxa atendo en antauxprizono, decidas dronigi siajn familiojn en sxuldojn, ecx estigante novajn forsxtelojn. La drasta socia malegaleco jen ebligas kaj poste kondicxigas la multecon de la kontrauxlegxaj kondutoj cxiam pli pezaj, pli oftan legxorompigxon. Gxuste tio estas ja la maniero per kiu la legxo cxe ni estas kolapsigita (same kiel tion antauxvidis Aristotelo).

Ah, jes, tie estis ankaux kelkiu pro korupteco. Li estis akceptinta 100 euxroj kiel sxmirmonon. Du monatoj lin enfermigis en la prizono. La prizonulo kostas al la sxtato 15 euxroj tage, do 900 euxroj estas elspezitaj por la koruptulo de 100 euxroj. Cxi kazo de korupteco estis multe pli interesa ol tiom jam dirite. Estante municipan oficiston unu civitano estis ofertinta al li 100 euxroj por plirapidigi la ellancxon de persona dokumento. La oficisto ja konfesis ke li envere estas ricevinta 100 euxrojn. Sed, jxus kiam li estis descendinta tra la sxtuparon, cxirkaux 20 policistoj cxirkauxis kaj arestis lin. Inter ili estis ankaux policistoj el la specialaj trupoj.

La koruptito jam en la prizono estis legante la tagjurnalon kie oni skribis pri la dekoraciojn kaj gradojn akiritajn de la policistoj sukcesaj en la batalo kontraux la korupcion. Paralele, ie en iu oficejo de USAID³, kiam reprezentanto de iu Kosova neregistara organizajxo estis enmanigante sian sesmonatan raporton, oni substrekis ke la jxus malkovrita kazo ne estis inkluzivita en la definitivaj statistikoj. Tamen la kampanjo kontraux korupcion estis aprecita kiel ajn sukcesplena. Unu helpantino estis parolante pri la invitleroj al la koktejla akcepto okaze de la finigxo de la kampanjo. Dume sxi spertis ian dolxecon kiam sxi estis tajpante la nomojn de la cxefaj politikistoj kaj aferistoj de la lando...Bonan tagon!-diris sxi. Mi ektimigxis. Sxi ja interruptis tiun cxi fluon de memorajxoj kaj meditajxoj el la prizona vivo. Konstenite, cxe la pordo de la oficeja korto, mi vidis kiel sxi malrapide ensxargxis la nigran najlonan sakon en la kamionon por la forjxetajxoj.

Kaj nun mi vidis laboriston de la forjxetajxoj Oh, mi ne povis forgesi ties vizagxon! Vestita orangxkoloro. Estis gxuste N. El la cxambreto nr 7 de la suda flanko. Miaj okuloj restis cxe la orangxkolora uniformo. "Ah, cxi tioj!"- eldiris li ne lasante min ekparoli. "Tiel oni vestigis nin por ke nin oni pafu enkaze de iu eskaptento. Cxi tie mi havas ilin por ke la auxtoj ne pafu min cxar mi ne havas iun alian lokon kien iri". En la prizono li restis malgaje kaj silente. Nun li estis ridante maldolxe. Dum li marsxis tiel pumpmaniere post la kamiono miksinta la forjxetajxojn, mi konstatis ke oni surmetis al la sekligno kelkajn lacxojn..

Prisxtina 22an de majo 2008

Albin Kurti

Enesperantigis Bardhyl Selimi

³ Usona sxtata organizajxo kiu disdonas helpajxojn al malricxaj landoj

¹ Albin Kurti 30 jarulo, diplomita pri juro, estras la tutpopolan movadon Vetevendosja (Memdecido) kiu postulas starigxon de auxntenta memstara sxtato de Kosovo, sendepende de UNMIK aux ties posteuloj agnoskante la bezonon de plurestado de NATO trupoj gxis kiam Kosovo fondos sian propran armeon. Dum la milito en Kosovo 1998-1999 li estis arestita de serba polico kiel aktivisto de UÇK (Naciliberiga armeo de Kosovo) kaj enprizonigita en Serbio dum kelkaj jaroj. Danke al la premo de internacia opinio, oni liberigis lin. Aktuale li suferas alian prizonon, same politikan pro siaj vidpunktoj direktantaj la movadon Vetevendosje. Fakte interla nuntempaj kosovaj politikistoj li estas la vera opoziciulo.

Poeziajxoj

Amoro – Ebrío

Mildeta venteto
formiĝas je ŝtormo,
galopa ventego,
sonora tempesto,
hurla uragano,
forta fulmotondro,
zigzaga ciklono,
turalta tornado,
torenta tajfuno
pliiĝas senĉese
febra amebrio,
kiam ambaŭ korojn
per fluganta sago
trapikas Amoro.

(Kantante Vivi – 2006 – Szolnok)

Stefano Pál

Epigramoj

1. Nur unufoje dumtage - de la nula, ĝis la 24-a horo,
nur unufoje dumjare - ekde la novjaro, ĝis fino de decembro,
nur unufoje dum mia vivo - ekde la ekvido, ĝis lasta okulfermo -
mi volus vin ami...

2. Denove estas unu tago for, denove ni alproksimiĝis al la fina etapo de feliĉo, kiam ni jam absolute bonfartos, kiam ni pri ĉio absolute indiferentos, kiam nin kapablos movigi nur tertremo, tsunami, aŭ ia simila superfrenezaĵo de nia kara Panjo Tero

3. Bonmatenon, Maten' de mia Sopro,

Tagmez' de ĝia Estiĝo,

Vesper' de ĝia Realiĝo, Reciproka Sindoniĝo

Centra Komitat' de mia Vivo,

Epicentro de ĝia orbitado:

Vi, ununura Senco de mia sensenca Esto...

4. Bonan matenon!

Kiam do estas bona la mateno? Tiam, kiam en TV-sciigoj oni ne parolis pri ni, ni ne estis objektoj de ia krim-delikto, neniu nin prirabis, nek mortigis, ni ne suferis aŭtomobilan

akcidenton, nia domo ne forbrulis, inundo ĝin ne forlavis kaj la polico nin (ankoraŭ) ne arestis...Bonan matenon...!

Teodor Andreas

Cxerpita el nordhungaria revuo

Cxerpita el Nordhungaria Informo)

Al teroristo

Vin regas certe bela idealo

Pri estontec' laux ideologi'!

Vin nun luktadas kontraux kapitalo,

Popolo, registaro aux parti'.

La malamikojn volas vi likvidi

Por meti finon al la kontrauxul',

Kaj la malamon vi ne volas bridi:

Minacoj, murdo, pafo sen skrupul'.

"La cello ja nobligas la metodon".

Jen la devizo de la senmoral'.

"Per cxuiuj fortoj kontraux l';antipode!

Per cxuiuj fortoj por la ideal'!"

Ne gxenas vin la varma rugxa sango,

Gutanta sur la brusto de l'cxemiz'.

Ne gxenas vin la larmo sur la vango,

Se gxi kondukas al la paradiz'.

Sed pro l' teroro cxiam vi forgesas,

Ke nur perforton donas la perfort'.

Se cxiam kaj sename vi agresas,

Nur fugx' kaj timo estos via sort'.

Auxskultu vi la veojn de la homoj,

Pro murdoj, homoraboj kaj angor',

Cxar unuigxas cxiuj idiomoj

En la kondamno de la fiteror'.

Ne gravas ajnaj ideologioj,

Se homoj banas sin en rugxas sang'.

Ne logas nin la foraj utopioj,

Se larmoj devas gliti sur la vang'.

Leif Nordenstorm

Cxerpita el SEKECI Poetas 1987

Mi sxatis igxi

Por la falanta: spong' elasta, mola;

Por pesimisto: flago verda, ora;

Balzam', bandagx': por la vundito;

Futur' : por la konservativo;

Por la amare lamentant' : mielo;

Por la sendorma infanet' :fabelo;

Por la gxojanto: Aliulo,

La gxojon dividanto per gratulo;

Por la senhejma: varma cxambro eta;

Por la malsatanto: blanka pano preta;
Kunul' :por rigardanto la ielon;
Por prodigant' : direkta pado, celon
Montranta ale al la hejma vojo;
Por subpremito: fort', aplomba volo,
Levanta lin ecx el profundo, polvo;
Por cxefo, potencul' : humilo;
Por la forjxet' de maskoj: ilo;
Por hezitanto: firma, certa rook;
Garantiajxo ora: al la vorto;
Por olda hom' : apogbastono, forto;
Finfine por mortant' : konsol', espero:
"la fin'-komenco"; tiu cxi la vero.

Julio Varga

(samloke)

Humorajxoj

ŜERCO

Fajnaj manĝaĵpecoj atendas la novedzon hejme.

- Kion vi kuiris hodiaŭ, karulino?

- Mi ne scias, ĉar la etikedo degluiĝis de la konservskatolo.

Esperantigis László Pásztor

(cxerpita el Nordhungaria Informo)

Jidaj anekdotoj

Usono.

Tri judaj filoj forlasis la hejmon, eklaboris kaj post multaj jaroj ege ricxigis. Unu tagon ili renkontigxis kaj interdecidis acxeti donacojn al sia maljuna patrino. Diris la unua filo: "Mi donacos al si grandan, luksan domon." La dua diris: "Mi donacos al si luksan automobilon kun sxoforo."

Diris la tria filo: "Mi donos al si la plej bonan donacon. Vi scias, ke Panjo tre amas legi la Toraon, sed ne plu kapablas bone vidi. Mi auxdis ke ekzistas granda papago, kiu scias parkere la tutan Toraon ("juda" papago...).

Necesis 10 jaroj por gxin instrui. Mi jam kontrolis kaj scias, ke mi devos pagi \$1,000,000 por jaro dum 20 jaroj por acxeti gin, sed gxi valoras la penon. Panjo nur devos diri la cxapitron kaj la versiklon, kaj la papago tuj deklamos gxin."

Post nelonge, Panjo sendis al la filoj dankleterojn.

Al la unua filo si skribis: "Milton, la domo estas tro granda. Mi logxas en unu cxambro, sed devas purigi la tutan domon."

Al la dua filo si skribis: "Marvin, mi estas tro maljuna por veturi. Mi restadas hejme kaj neniam uzas la auxton."

Al la tria filo si skribis: "Melvin, mia kara. Vi estas la nura filo, kiu havas la prudenton scii kion sxatas via patrino. La kokino estis tre tre bongusta!"

Fripono

Rabeno, kiu malfermis matene la alvenintajn posxtaĵojn, trovis en unu koverto blankan paperfolion, sur kiu estis skribita nur unu vorto:

FRIPONO!

Vendredon vespere en la sinagogo, tuj post la Sabata parolado, li anoncis: "Mi renkontis multfoje homojn, kiuj skribis leterojn sed forgesis subskribi ilin. Sed cxi-semajne okazis al mi io tre interesa: mi ricevis

leteron de iu, kiu subskribis sian nomon sed forgesis skribi la leteron mem...”

Enmigrado el Soveta Unio al la juda sxtrato

En la 1970-aj jaroj en Sovetunio Brejxņjev, gxenerala sekretario de la komunista partio, demandas al Kosigin, la cxefministro:

- Cxu estas multe da hebreoj en nia lando?
- Cxirkau tri-kvar milionoj.
- Se ni al cxiuj permesos forveturi en Israelon, cxu multaj ekvolos?
 - Cxirkau dek-dek kvin milionoj.

Freud kaj la juda humuro

Enkonduko:

La germandevena vorto **Snorer** est- (*Fonto: la retlisto de amantoj de judaj humorajoj*

estas ofte uzata en la jida lingvo. Gxi signifas almozpetanton kaj ankaux homon, kiu gajnas monon, ne per laboro, sed per kolektado de mondonacoj cxe ricxuloj.

Oni multe kritikis siatempe en Euxropo tiujn judojn, kiuj “snoreris”, cxu por si mem cxu kiel delegitoj de diversaj judaj bonfaraj asocioj, religiaj studejoj ktp.

Sigmund Freud esploris la judan humuron. En sia libro “La sxerco kaj gxia rilato al la nekonscio” (*Der Witz und seine Beziehung zum Unbewuβten*, 1905), li priskribas la psikologian aspekton de la judaj sxercoj kaj ecx prezentas kelkajn el ili. Interalie li skribis:

“Mi ne scias, cxu multaj estas la popoloj, kiuj tiom multe sxercas pri si mem kiom faras la judoj”.

Jen unu el la sxercoj de li prezentitaj:

Snorero

Juda snorero petas de la barono monon por iri al la kuracbanejoj de Ostande, sekve de rekomendo de sia kuracisto.

Barono: “Sed Ostande estas tre multekosta loko. Ankaux pli malmultekosta loko suficxos por kuraci vin!”

Snorero: “Sinjoro barono, por mia sano nenio estas tro multekosta.”

Cxerpita el la Triesta Bulteno

Okazas!

- *Amikino mia kara, via edzo estas ebrulo.*
- *De kie ja vi scias tion?*
- *Kiam ajn venante en la kafejon, mia edzo trovas lin tie.*

Du arabaj fabeloj

La luno en la puto

lun vesperon, virino kune kun sia edzo iris al puto por trinkigi la azenon. La luno, ronde rinda, speguligis en la puta akvo. Subite gi malaperis, car kovrita de nubeto. La edzino alkriis al la edzo, tute mirigita: "Rigardu, la azeno eltrinkis la lunon!" Tiam la viro ekbategis la kompatindan beston, elkracante: "Nu, nu, rapide, elvomu la lunon kiun vi forglutis!" Intertempe tiu nubeto, kasinta la lunon, glitis for kaj la astro reaperis en la puto. Gojaj, la geedzoj reiris hejmen, kaj kontentaj, ke ili sukcesis eligi gin el la stomako de la azeno.

La avarulo

Estis iam tiom avara viro, kiu al sia edzino donis kiel mangajon nur akvecan supon kaj senkondimentan kuskuson. Se hazarde ce li ekvenis gastoj, li kasigis por ne esti devigita regali ilin per pano kaj mielo, lau la lokaj tradicioj.

lun tagon venis liahejmen la du fratoj de lia edzino, por viziti sin. Al ili si plendis kaj rakontis kelkajn epizodojn pri la edza avareco. Ekkoleris la fratoj kaj sekve, akorde kun si, decidis doni neforgeseblan lecionon al tiu avaraculo. Tial ili iris al bazaro, acetis iun dormigan pulvoretan kaj invitis la edzon por komuna tagmango. Li mangegis abunde, cefe pro la fakto ke gi estis senpaga kaj, liaopinie, la regalitaj mangajoj ec pli bongustas ol tiuj mem pagitaj! Dume la fratoj cee observadis lin. Finmanginte, kune ciuj reiris hejmen.

Tuj post hejmigo, la viro profunde endormigis pro la granda kvanto da dormigilo englutita mangante. Nokte, la du fratoj lin envolvis en blanka littuko, kies ciujn flankojn ili kunkudris, lasante nur etan truon je la supro por la kapo: post tio, tiun pakajon ili portis al tombejo. Iom poste, kauze de malvarmo kaj malkomforta pozicio, la edzo vekigis.

Intertempe la du fratoj estis sin maskintaj per bestaj feloj. Bastone, ili supersutis lin per hajlado da batoj, kio lin vekis komplete: tiam li konsciigis esti en tombejo, ene de tombo, kaj, ekvidante la du bestecajn figurojn, konvinkigis ke tiuj estis *Munkir* kaj *Nakir*, la du jug-angeloj. Tiam li ekgemis kaj petegis pri indulgo. La du maskitaj uloj komencis rapidritman pridemandadon: "Kiam ajn vi donacis ion al malriculoj?" "Kiam ajn vi acetis novan veston al via edzino? Kiam vi regalas sin per satiga mango?" Multis la demandoj kaj ciam sama estis la respondo: "Tion mi ne faris! Tion mi ne faris!" La viro, sub tiu pluvado da demandoj, ekploris, sed la fratoj ec pli forte lin bategis, gis kiam li svenis. Je tiu punkto ili reportis lin al lia hejmo kaj rekomendis al la fratino: "Ne faru al vi zorgojn, lasu lin dormi, kaj morgau matene vi konstatos, ke li resanigis de tiu aca malsano: la avareco!"

En la morgaŭo, post vekigo, la edzo iris al la bazaro, plenigis sian provizkorbon per multaj bongustajoj kaj per ĉio ajn kio estis bezonata hejme. Al ĉiuj almozpetantoj, renkontintaj survoje, li donacis plurajn monerojn; por la edzino li acetis belan veston, kaj fine rehejmgis. La edzino ĉe ne povis kredi realaj tiujn delikataĵojn kiujn li alportis. Felica estis tiu edzino pro la neatendita transformigo de la edzo, kaj ekde tiam ŝi ne plu havis kialon plendi pro lia sinteno, ĉar li plu vivadis, kondutante ĉiam tre malavare kaj grandanime.

Artikoloj publikigitaj sur IPR

El la REVUO ipr 2008/2

Dialektiko en Matematiko

de Bardhyl SELIMI (Albanio)

Dialektiko estas komprenata kiel arto de la logika rezonado, la ĉerpado de konkludoj rezonante logike, uzante la kontraŭdirojn en lapensado, arto de logikaj diskursoj ktp. La praa HERAKLITO diris, ke „oni ne povas enakviĝi en la sama akvo de la rivero ĉar ĝi moviĝas senĉese”.

PLATONO aldonis, ke „ĉio fluas konstante, sendepende de la imagoj kreaĵoj de niaj sensoj”.

SOKRATO malkovris la verojn pere de demandoj al asertoj plenaj de kontraŭdiraĵoj, kiujn li starigis al la kunkonversaciantoj.

Hodiaŭ dialektiko komprenatas kiel la tuto de la principoj de la pensado kaj rezonado resumeblaj jene:

Leĝo de kontraŭdira karaktero de ĉiu objekto aŭ fenomeno.

Leĝo de senĉesa moviĝo kaj ŝanĝiĝo de ĉio enmondo.

Leĝo de neado de la neado.

Leĝo de transpaso de kvanto al kvalito

Leĝo de progresiva evoluo en formo de spiralo.

Dialektiko estas sendube ia potenca ĝeneraligo de la ordinara formala logiko posedata de homoj kaj uzata dum ĉiutagaj rezonadoj, kie okulfrapas parte la leĝo de ekskludenda trio, kio signifas, ke inter du kontraŭaj eldiroj pri la sama objekto kaj sama loko nur unu estas ja vera, dum la alia estas malvera. Ekz.: „Mi estas hejme” kaj „Mi ne estas hejme”.

Certe nur unu el ĉi tiuj eldiroj estas vera.

Sed la formala logiko estas malforta por solvi eksterordinarajn situaciojn kie povas interveni la homo. Tial iu filozofo diris, ke „la formala logiko similas al tiu ĉasta sinjorino ene de la kortomuroj de sia hejmo, kiu ĵus transpasinte tiujn murojn involviĝas en la plej strangaj kaj surprizaj aventuroj”.

Ni ilustru ĉi tion per la ekzemplo cirkulanta en la studentaj rondoj:

„Dum iu pluvŝtorma tago juna viro veturis per sia malgranda, dusidloka aŭto. Ie for de la urbo, ĉe busstacio sur la stratorando, li rimarkis tri personojn: unu ŝajne tre malsanan maljunulinon, unu mediciniston, kiu iam savis al li la vivon kaj unu belan modelulinon. Kiun el tiuj tri li invitos en sian aŭton?”


La formala logiko kondukus lian penson al la analizo de ĉiu persono aparte, laŭ kiu indus inviti kaj la maljunulinon evidente tre malsanan pro humanismaj kialoj, kaj la mediciniston pro moralaj kialoj, kaj ankaŭ la belulinon, pro spiritaj kialoj. Sed kion ja faris la viro en ĉi tiu eksterordinara situacio? Li elaŭtiĝis kaj enmanigis la ŝlosilojn al la medicinisto petante lin kunvojaĝi kun la maljunulino,

dum li mem restis ĉe la busstacio kun la belulino atendente la sekvan buson.

La popolo delonge estas malkovrinta la dialektikon de la vivo, kio estas esprimita jam en ĝiaj proverboj kaj saĝaj vortoj. Ni menciuj ekz. Nastradinon kiu ĉiufoje, kiam li malsupreniris la ŝtuparon, ploris ĉar li rememoris, ke li devos denove supreniri ilin.

Ĉu dialektiko speguliĝas en matematiko? Certe jes.

En la matematiko, komencante de la elementa, oni renkontas konceptojn kaj operaciojn tute kontraŭajn, kiel pluso kaj minuso, multipliko kaj divido, potencigo kaj radikiĝo, eksponencialo kaj logaritmo, diferencialado aŭ derivado kaj integralado. Ofte oni renkontas tiel nomatajn paradoksaĵojn ankaŭ en matematiko. Ni



rigardu ekzemple la apudan figuron. Oni povas atingi B de A laŭ pluraj vojoj, interalie laŭ arko de duoncirklo je diametro AB aŭ laŭ

tiuj sinsekvaj arketoj sa me duoncirkloj sed je diametroj je duono, kvarono, okono ktp de AB. Kiu vojo pli longas?

Kelkaj povas aserti, ke pli mallongas la unua vojo, kio ne veras.

Se ni plenumas sinsekve du kontraŭajn operaciojn, ni akiros la unuan esprimaĵon. Ekz.: $\sqrt{a^2} = a$ por $a > 0$, do la elradikiĝo de kvadrato donas a mem;

– inverse (

$$\sqrt{a}$$

$(\sqrt{a})^2 = a$, do la dua potenco de la radiko donas a mem;

– la produkto de du negativaj nombroj donas pozitivan nombron:

$$(-) * (-) = (+).$$

– la inverso de inverso donas la nombron mem:

$$1/(1/a) = a;$$

– logaritmo je bazo a de la potenco x donas x mem:

$$\log_a a^x = x;$$

– la potenco de logaritmo surbaze de a de x donas x mem:

$$a^{\log_a x} = x$$

– la diferenciale de integralo de f(x) donas f(x):

$$d \int f(x) dx = f(x)$$

– la integralo de diferenciale de f(x) donas denove f(x):

$$\int df(x) = f(x)$$

La supre menciitaj ekzemploj atestas ja pri la apliko de la leĝo de neado de la neado.

La historio de la evoluo de la matematika penso fakte estas ja historio de la dialektika evoluo de konceptoj, metodoj, teorioj ekde antikveco ĝis nuntempo. Se la tiel nomata elementa matematiko, de konstantaj grandoj spegulis pli-malpli la moviĝon kaj la ŝanĝiĝon, la matematiko de la lastaj tri jarcentoj, la kalkulo aŭ diferenciale kaj integrala kalkuloj formiĝintaj danke al Njutono kaj Lejbnico spegulis ĝin plene kaj adekvate. La ideo de variablo dependa kaj sendependa (funkcio) eniris vaste en matematikon kaj trovis poste sennombrajn aplikojn en la aliaj natursciencoj kaj en la


teĥniko. La koncepto de derivaĵo kiel rapideco de ŝanĝiĝo de la funkcio depende de argumento spegulas ja ĝuste tiun dialektikon de la aĵoj. Samtiel la konceptoj de infinitezimo, limeso ks.

Ankaŭ en matematiko la konceptoj havas sian historion de naskiĝo, evoluo kaj perfektigiĝo, ĝeneraliĝo. Ni prenu ekzemple la nombron:

Je komenco ĝi esprimis la komunan kvantecan karakterizaĵon de aroj kiuj povus inter respondi inter si. Ni diru, ĉiuj aroj enhavantaj tiom da elementoj kiom da fingroj estas sur la mano, karakteriziĝas de la nombro kvin; tiuj, kiuj interrespondas kun la piedoj de la hundo karakteriziĝas de la nombro kvar, ktp. Estiĝis tiamaniere la unua nombraro, la numeroj naturaj 1, 2, 3,...

La divido de aĵoj en partoj helpis al la ideo de frakcioj. Poste oni komprenis, ke devas ekzisti ankaŭ alispecaj nombroj malpli konkretaj kiel la negativaj kaj nulo inter ambaŭ aroj. La negativaj nombroj interpretiĝis kiel ŝuldoj kontraŭ riĉaĵoj, perdoj kontraŭ profitoj ktp. La nova nombraro nomiĝis racia. Kiam matematikistoj renkontiĝis kun la rilato de diagonalo de kvadrato al ties eĝo, ili ekkomprenis, ke temas jam ne pri iu frakcio, tiuj segmentoj ne povus kunmezuriĝi, tio estas, ne estus eble prezenti la longon de diagonalo kiel finia aŭ nefinia decimala nombro de formo 3,4155555 aŭ 3,256 ks.

/



La evoluo de la koncepto de nombro


Tial ili eknomis la novan nombron malracia kaj la novan aron malracia aro kiu rezultis notinde pli granda ol la racia mem kaj plenigis kune kun la raciaj komplete la nombroakson. Ĝi nomiĝis reela aro.

Plue, la aro de ordigitaj reelaj paroj formas la aron de kompleksaj nombroj je formo $a + bi$ kiu reprezentas pluan ĝeneraliĝon de reelaj nombroj. Tiu ĉi proceso kontinuas ankoraŭ hodiaŭ per ĉiam novaj aroj kaj montras la progresivan evoluon de unu ĉeno de spiralo al alia pli alta.

Nature oni atendis por la novaj nombraroj, ke ili konservu la ecojn de antaŭaj, sed ekhavu ankaŭ novajn ecojn, esprimante tiel la transpason de kvantaj ŝanĝiĝoj al kvalitaj. Tiel, por la naturaj nombroj ne ĉiam havas signifon la rezulto de subtraho, ĉar ekz. 7-

10 ne donas naturan nombron, kio ne okazas ja en la aro de entjeraj nombroj Z kaj en la plej superaj aroj.

Por la entjera nombraro ne ĉiam havas signifon la operacio de divido, ĉar ekz. $7/10$ ne estas entjero, dume tio estas normala por la aro de frakciaj nombroj aŭ racia nombraro.



N 2, 5, 1000, 198790 ktp

Z 8; -7; 0; 2000, -45000

Q $2/3$, $5/100$, $-2/7$, 0.56; 2,455555..

R π , -4, $2/9$; 3.57, $\sqrt{2}$, $-\sqrt{8}$, e , $2-\sqrt{3}$

K $2+5i$; $\sqrt{-1}$, $\sqrt{-8}$, $2(\cos 20 + i \sin 20)$

La elradikiĝo ne ĉiam havas signifon en la aro de reelaj nombroj ĉar ekz. la dua radiko de minus unu ne estas reelu, sed ĝi estas ja

kompleksa nombro. Samtiel, se ni esploras la dekomencan koncepton de la aro. La finiaj aroj akceptas la leĝojn de aritmetiko, kiel ekz. la leĝon de interŝanĝo de pozicioj $A+B=B+A$ kaj $A+B>A$ aŭ $A+B<A$, dum por nefiniaj aroj oni konstatas ankaŭ kvalite novajn leĝojn. Ekz. en ili povas esti $A+B=A$. Ni prenu la aron de numeroj (naturaj nombroj) kaj aron de paraj numeroj. Ili ambaŭ entenas senfine da elementoj, tamen ili ne povas submetiĝi al la rilatoj $A>B$ aŭ $A<B$, kontraŭe por ili validas la rilato $A+B=A$ ĉar ĉiu para nombro estas samtempe ankaŭ natura nombro.

Similaj konkludoj povas akiriĝi se ni komparas la finiajn seriojn kun tiuj de nefiniaj. Por ili oni ne ĉiam povas apliki la leĝojn konstatitajn por finiaj kaj konverĝaj serioj, tio estas ekz. oni ne povas ilin derivi aŭ integri po unuopaj termoj. Aŭ ili povas rezultigi post adicio ne ĉiam difinitajn seriojn, ĉar okazas, ke la sumo de du nefiniaj serioj povas rezultigi iam konverĝan iam ne konverĝan seriojn:

$$\sum_1^{\infty} 1/n, \sum_1^{\infty} 1/n^2, \sum_1^{\infty} 1/n + \sum_1^{\infty} 1/n^2, \sum_1^{\infty} 1/2n - \sum_1^{\infty} 1/2n$$